

人民中國報道

# El Popolo Cinese

Maj. 1952

5



# MAJTAGO, 1952

La laboranta popolo de nova Ĉinio bonvenigas la Unuan de Majo, la grandan internacian feston de la laboristaro, kun novaj brilaj sukcesoj en la politika, ekonomia kaj kultura konstruado de la Nova Demokratio kaj en la batalo por mondpaco.

Tiun ĉi Majtagon, la ĉina popolo bonvenigas al sia ĉefurbo, Pekino, grandan amason da gastoj el multaj landoj, el ĉiuj klasoj de diversaj politikaj kaj religiaj kredoj kaj multaj nacioj. Tie ĉi estas la reprezentantoj de la frataj landoj, de grandaj sindikatoj, kulturaj delegacioj kaj elstaraj kulturaj gvidantoj de aliaj landoj, batalantoj de la mondpaca movado, popolaj delegitoj el diversaj landoj, kaj partoprenintoj de la Internacia Ekonomia Konferenco antaŭ nelonge okazinta en Moskvo.

Tio ĉi estas frapa esprimo de la vastaj rilatoj de amikeco interligantaj la novan Ĉinion kun ĉiuj aliaj popoloj de la mondo. La gastoj de Ĉinio vidos propraokule la brilan realon de la novdemokratia Ĉinio, la neatakeblan solidarecon de la unuiga fronto de la demokrataj klasoj kaj la nacioj de Ĉinio gvidataj de la laboristaro, la roko sur kiu fondiĝas la kreiva forto de la nova Ĉinio. Ili vidos la rekordrompajn sukcesojn en industrio kaj agrikulturo; la brilan antaŭenpuŝiĝon en eduko kaj kulturo. Ili vidos la grandajn plibonigojn en la viv-normoj de la popolamasoj, kiuj rezultiĝis el tiuj ĉi atingajoj en lando kie la popolo estas la mastro. Ili vidos la produkt-entuziasmon de la popolo, inspiritan de alta revolucia konscio, de nova sinteno al laboro.

La sukcesoj de nova Ĉinio en la pasintaj du kaj duona jaroj jam demonstris konklude la superecon de la novdemokratia sistemo super kapitalismo. La ĉina popolo sub la gvido de la Centra Popola Registaro, la glora Komunista Partio de Ĉinio kaj sia amata gvidanto Maŭ Ze-tung, estas sindone laboranta por la plua disvolvo de ĉiuj branĉoj de la landa ekonomio en preparo por la industriigo de sia lando. Niaj gastoj vidos grandan popolon en la plena konfido pri sia forto kaj la korekteco de la vojo, kiun ĝi elektis, antaŭen marŝantan per firmaj kaj certaj paŝoj.

Ili vidos popolon firmdecidintan defendi siajn grandajn revoluciajn atingajojn. La

nunaj movadoj por pliprodukto kaj ŝparo, kaj kontraŭ korupta alproprigo, malŝparo kaj burokratismo estas senmezure fortigantaj la popolan ŝtaton kaj firmigantaj la gvidantecon de la laborista klaso.

La decidemo de la ĉina popolo haltigi la incendiojn de nova mondmilito estas montrita en agado. La plej bonaj gefiloj de la ĉina popolo, batalantaj ŝultron ĉe ŝultro kun la heroo popolo de Koreio, jam donis frakasajn batojn al la brutaj Usonaj agresantoj kaj devigis ilin ekkonduki armistican traktadon. Fiaskinte, tiuj agresantoj nun eĉ descendas ĝis la pleja profunda fieco en apliko de bakteria milito kontraŭ Koreio kaj Ĉinio.

Tiu nova krimo substrekas la signifon de la eventoj hodiaŭaj. Pli kaj pli la pacamaj popoloj malkonfesas la kalumniojn kaj mensogojn de Vaŝingtono kaj sin turnas por vidi la veran realon, kaj gvidi siajn agojn per ĝia lumo.

La ĉina popolo daŭre intensigos siajn klopodojn en la mondskala batalo por la esencaj bezonoj de la homaro. Ili demonstras en tiu ĉi tago de laborista klaso solidarecon por paca kaj abunda vivo baziĝanta sur justa kaj stabila fundamento; por la tuja malpermeso de la bakteriaj armiloj uzataj de la Usonaj agresantoj en Koreio kaj kontraŭ Ĉinio; por la kondamno de la militaj krimuloj; por la paca solvo de la korea problemo kaj aliaj problemoj en Azio kaj la mondo; por fini la koloniajn reĝimojn kaj ĉian subpremado kiu estas ilia fundamento. Ili daŭre batalados por interhelpo kaj solidareco inter la laborantaj popoloj de la mondo; por la paca kunekzistado de nacioj de malsamaj politikaj, ekonomiaj kaj sociaj sistemoj. Ili plene kredas je sukceso en tiuj ĉi celoj, ĉar la monda pactendaro kun la Sovetunio, nia forta alianco, ĉe la fronto estas unuece laboranta por ili.

La kreskanta ekonomia forto de la nova Ĉinio estas fidinda bazo por internacia paca kaj ekonomia kunlaborado. Kun sia ĉiam pli rapida antaŭeniĝo tra novdemokratio al socialismo kaj komunismo, sub la standardo de marksism-leninismo, gvidate de Maŭ Ze-tung, la ĉina popolo pruviĝos ĉiam pli forta defendanto de mondpaco kaj la intereso de la popoloj.



PREZIDANTO MAŬ ZE-TUNG



# ĈINAJ LABORISTOJ MARŜAS ANTAŬEN

La granda venko de la ĉina revolucio malfermis la vojon al prospero por la ĉina laborista klaso kaj la tuta ĉina popolo. Per la venko de la Liberiga Milito, la laborista klaso liberiĝis el sia pasinta vivo de sklaveco kaj plene plenumas sian rolon de la gvidanta klaso en la ĉina socio. De tiam la ĉinaj laboristoj, sub la brila gvidado de Maŭ Ze-tung, faras ĉiujn siajn taskojn kun sinteno de mastroj de la lando. En tia spirito, ili venkis ĉiajn obstaklojn kaj malfacilojn, reirigis kaj pliiĝis produktadon kaj riĉigis siajn proprajn vivojn.

Ĉinaj laboristoj organiziĝis en sindikatojn sub la Tutĉinia Federacio de Laboristoj. La sindikatoj ludas plej gravan rolon en la reirigo kaj disvolvo de nacia industrio kaj la fortikigo de nacia defendo. Ili gvidas kaj organizas la vastajn amasojn de la laborista klaso en gigantaj kampanjoj de rezisto kontraŭ Usona agreso kaj helpo al Koreio, de patriota konkurso, de pliprodukto kaj ŝparo, de demokrataj reformoj en fabrikoj kaj la transformo de industrio malnovtipa en novtipan. Membroj de la Tutĉinia Federacio de Laboristoj jam kreskis de 2,370,000 antaŭ du kaj duona jaroj ĝis 7,297,857 nun. Ĉi tiu granda, organizita forto garantias la plenumon de la konstruaj planoj de la ŝtato.

## Produktaj Atingoj

La ĉinaj laboristoj jam atingis grandajn sukcesojn en reirigo kaj ekspansiigo de nia moderna ekonomio. Post du kaj duona jaroj ekde la fondiĝo de la Popola Respubliko de Ĉinio, fervojoj, kiuj suferis severan damaĝon dum jaroj da milito, jam denove tute malfermiĝis al trafiko. Novaj fervoj estas konstruataj en la sudokcidentaj kaj nordokcidentaj provincoj. Ankaŭ ĉiuj 100,000 kilometroj da aŭtovojoj estas en plena funkciado. En la jaro 1951 la produkto de ferfandaĵo pliiĝis je 31 procentoj, tiu de ŝtalingoto, je 42 procentoj kaj tiu de premetendita ŝtalo je 78 procentoj ol en la jaro 1950. Karboprodukto en 1950 estis 28 procentoj super tiu de 1949, kaj en 1951 ĝi montris pluan pliiĝon je 18 procentoj super tiu de 1950. Elektro pliiĝis je 22 procentoj, cemento je 63 procentoj, kaŭĉuko radoj je 200 procentoj kaj papero je 30 procentoj. En la jaro 1951, plejparto de la ĉina industrio superis la plej altan jarprodukon en la historio: ŝpinaĵo je 59 procentoj, ŝtofo je 13.5 procentoj, papero je 55 procentoj, kaŭĉukoradoj je 66 procentoj, kupro je 233 procentoj, premetendita ŝtalo je 20 procentoj, kaj cemento je 7 procentoj.

## Sindikatoj Organizas Konkursojn

Laborkonkursiva movado estas elstara formo de la batalo por pli alta produkto farata de la ĉinaj laboristoj. Aktive kuraĝigate de la sindikatoj, la movado disvastiĝis al ĉiuj industriaj regionoj de nia lando. Ĝi atingis novan alton sub la stimulo de la movado rezisti Usonan invadon kaj helpi Koreion. Ĝis julio, 1951, ĝi ampleksis 2,233, 887 laboristojn, atingante proporciojn de pli ol 80 procentoj de ĉiuj industriaj laboristoj en individuaj regionoj. Plue, ne malpli ol 19,354 laborgrupoj partoprenis en la grupkonkursiva kampanjo iniciatita de Ma Heng-ĉang, la fama Nordorienta tornisto.

En tiu ĉi produkta konkurso, 86,541 laboristoj fariĝis labormodeloj, dum miloj da laborgrupoj fariĝis

modelaj brigadoj, en la unua duona jaro de 1951. Ili estas vivantaj ilustroj de la senlimaj saĝo kaj kapablo de sia klaso. Ili kreas novajn rekordojn en siaj propraj kampoj de laboro, studante la progresan sperto de produkto de niaj Sovetiaj fratoj, ellernante la plej progresajn kaj sciencajn labormetodojn. Ilia ekzemplo inspiras aliajn laboristojn pliiĝi produktadon amasoskale.

La patriota produkta kampanjo estis komencita en oktobro 1950 de la labormodeloj Li Jun, Ĉaŭ Kuo-ju kaj Ĉang Ze-fu, kiel parto de la kampanjo rezisti Usonan agreson kaj helpi Koreion. Respondante al la voko de la Tutĉinia Federacio de Laboristoj, la ĉinaj laboristoj de tiam kreis daŭran fluon da novaj produktorekordoj, kio efektiviĝis la sloganon, "Ĉiu plua produkto aldonas al nia forto en defendo de paco." En januaro 1951, ekzemple, la Tajjuana Fer- kaj Ŝtal-uzino faris ok sinsekvajn rekordojn en la kvanto de ŝtalo-fandita. Ministroj en la Kivana Karbominejo en Ŝantung-provinco faris landan rekordon de 258.78 tunoj da karbo po laborvico, uzante pneŭmatikajn drilojn. Maŝin-fabriko en Nordorienta Ĉinio, aplikinte Sovetian altrapidecan metaltranĉan metodon, pliiĝis sian efikecon 20oble. Laboristoj de Uzino N-ro 3 de la Ĉina Teksa Korporacio en Ŝanhajo produktis 1.25 funtojn da 20faden-gaŭga kotonŝpinaĵo po spindelo po 20 horoj da laboro. Ho Kien-ŝiu, 17jara ŝpinistino en Cintau, elpensis sciencan labormetodon kiu malpliiĝis la malŝparo de kotono sur ledaj ruliloj ĝis 0.25 procentoj. La plej alta trenkvanto de fervoja lokomotivo atingis 7,207.9 tunojn. La plej malalta karbomalŝparo de fajropova elektroproduktado jam reduktiĝis ĝis 0.485 kg.

La ĉina popolo scias ke la riĉo kreata per ilia heroo laboro ne povas esti plene uzata por la konstruo de la lando kaj pli bona vivo, se elementoj infektitaj de la malnova socio estas permesataj ŝteli, misuzi aŭ malŝpari iun parton el ĝi. En decembro, 1951, sub la gvidado de la Komunista Partio kaj la Popola Registaro, ili komencis grandan amasmovadon forigi la malbonan heredon de la pasinteco, elimini koruptan alproprigon, malŝparon kaj burokratismon en registaraj institucioj kaj publikaj entreprenoj. En privataj entreprenoj, la kampanjo centriĝis sur tiaj krimoj faritaj de parto de la nacia burĝaro, kiaj subaĉeto al personaro en la registaro kaj publikaj entreprenoj, kontrabando kaj impost-evito, ŝtelo de ŝtata posedajo, fuŝa laboro kaj uzo de netaŭgaj materialoj en registaraj kontraktoj kaj spionado por akiri ekonomian informon el registaraj fontoj por uzo en privataj spekulacio. La ĉina popolo ne povas toleri tiajn malbonfarojn kaj decidis absolute ilin elimini.

Gvidate de la Popola Registaro, la Komunista Partio kaj la Tutĉinia Federacio de Laboristoj, la organizitaj laboristoj fariĝis la plej bravaj batalantoj kontraŭ ĉiuj formoj de korupta alproprigo, malŝparo kaj burokratismo.

En forviŝo de koruptaj kaj kontraŭsociaj praktikoj inter leĝrompantaj dungintoj, la Komiza Sindikato, ekzemple, mobilizis 70-80 procentojn, kaj en kelkaj urboj 90 procentojn, de komercaj dungitoj por malkaŝi la neleĝajn agojn de dungintoj. La sindikato garantiis ke nenia dungito estos elpelita el laboro, minacata aŭ

punata, nun aŭ estontece, rezulte de siaj agoj en malkaŝo de tiaj malbonoj.

### Laboristoj Fariĝas Administrantoj

Dum la pasintaj du kaj duona jaroj, multaj miloj da labormodeloj kaj elstarantaj laboristoj fariĝis industriaj gvidantoj kaj administrantoj. En la jaro 1950, pli ol 7,000 ministroj promociiĝis ĝis sekcioĉefoj, teknikistoj kaj administrantoj. Sur la fervojoj, pli ol 12, 400 laboristoj prenis administrajn postenojn de post liberiĝo. En Orienta Ĉinio, laŭ ne komplete statistiko, 7962 laboristoj promociiĝis produkto-administrantaj kadroj, el kiuj 2040 fariĝis fabrikestroj aŭ vicfabrikestroj. La ĉina laborista klaso nun lernas administri industrion same kiel la ŝtaton, ke ĝi gvidu la landon al des pli grandaj sukcesoj.

Kiel mastroj en sia propra lando, la ĉinaj laboristoj konstante aplikas siajn mensojn al la solvo de la plej komplikaj problemoj pri produktado. En 1951, ne malpli ol 147,670 inventoj kaj raciigaj proponoj estis faritaj de laboristoj, el kiuj pli ol 108,000 estis akceptitaj kaj efektivitaj. Ĉi tiu rimedo, kaj la iniciativo de laboristoj organizi material-ekonomion kaj elimini malŝparon, ege plirapidigis la reirigon kaj disvolvon de nia ekonomio. Tiamaniere la laboristoj multe kontribuis al la akumulo de kapitalo por la grandskala industriigo de Ĉinio en la proksima estonteco.

### Pli Altaj Salajroj; Pli Granda Sekuro

Du kaj duona jaroj de liberiĝo jam donis grandajn materiajn fruktojn al la ĉina laborista klaso. La tuta popolo profitas de la stabiliĝo de varprezoj kaj la bridigo de la senbrida inflacio kiu markis la lastajn dek du jarojn de Kuomintanga regado. En tiuj tagoj, la prezoj de artikloj de ĉiutaga uzado kelkiam saltis kelkajn fojojn en unu tago, kaŭzante akrajn suferojn al laboristoj kaj iliaj familioj. Nun ĉio forpasis.

Samtempe, salajroj konstante altiĝas. En Nordorienta Ĉinio, ekzemple, salajroj en junio 1951 estis 2.6oble tiom kiom en marto 1948. Tra la tuta lando, la putra, komplikaj kaj neracia salajrsistemo de la pasinteco rapide ŝanĝiĝas. La nova salajrsistemo baziĝas sur du justaj principoj: "pago laŭ laboro farita" kaj "egala pago por egala laboro".

Kune kun la pliiĝo en realaj salajroj, la sekuro de laboristoj kaj iliaj familioj estas garantiita de la nova *Laborasekura Regularo*, kiu ekde la 1-a de majo, 1951 jam aplikiĝis en plejparto de industriaj, minaj kaj transportaj entreprenoj kun cent aŭ pli ol cent laboristoj. La tutan koston de laborasekuro en Ĉinio portas la ŝtato aŭ la dungintoj. La laboristoj ne bezonas ion pagi por ĝi. Avantaĝoj kaj monsubtenoj estas deciditaj laŭ aktuala bezono de la laboristo kaj pagata tra la tuta periodo kiam la bezono ekzistas. La asekuro estas ĉiufanka en naturo kaj provizas difinitajn materiajn garantiojn en infannasko, maljuneco, malsano, vundo, kripliĝo aŭ morto. Ĉi tiu sistemo, diferenca en principo de iu ajn kiu povus ekzisti en kapitalista lando kaj senkompare pli progresiva, jam etendiĝis al 2,600,000 laboristoj kaj iliaj familioj entute 10 milion personoj.

La ĉinaj sindikatoj jam establis 33 sanatoriojn, ok ripozhejmojn, 14 hejmojn por maljunaj kaj kriplaj laboristoj kaj 136 ripozhejmojn por uzo post laborhoroj. Ĉi tiuj institucioj ofte sidas en privataj palacoj aŭ vilaoj iam posedataj de membroj de la antaŭa reganta klaso, en sanigaj vizitadejoj kaj pitoreskal lokoj.



Por la industriigo de nia patrolando!

Plakato de Liu Paŭ-in

Krom ĉi tiuj provizoj, grandaj plibonigoj ankaŭ efektiviĝis en labor-kaj san-kondiĉoj en fabrikoj kaj minoj, kiuj estas senprecedencaj en ĉina historio kaj iras multe pli malproksimen ol en industrie progresaj kapitalistaj landoj. Sole sur la fervojoj, sumo egala al 50,000 tunoj da greno estis elspezita pro tia laboro en 1951, kun la rezulto ke estiĝis drasta malpliigo en kazoj de malsano, vundo aŭ morto. Inter ĥemiaj laboristoj, la kazoj de profesiaj malsanoj malpliigis de la konsternega cifero de 70 procentoj en iuj entreprenoj en Kuomintanga tempo ĝis 0.5 procentoj nuntempe. En la mina industrio, la nombro de homoj mortigitaj dum laboro malpliigis je 83.3 procentoj kaj vundoj malpliigis je 59.7 procentoj en unu sola jaro. Industriaj akcidentoj kaj vundoj malpliigis en ĉiuj aliaj tipoj de produktado.

Dum ĉiuj ĉinaj laboristoj profitas el la revolucio, la plibonigo en la pozicio de laboristinoj estas la plej granda. Salajroj de virinoj en antaŭliberigaj fabrikoj neniam superis du trionojn de tiuj de viroj por la sama laboro. Laboristinoj havis nenian ajn profesion sekuron; maljuneco kaj gravedo kaŭzis aŭtomatan maldungon. Promocio preskaŭ ne ekzistis; iuj virinoj penlaboris dum tridek jaroj en la sama fabriko kaj ankoraŭ ricevis salajrojn de "dumtempaj laboristinoj." Kontraŭ la personaj insultoj de viraj posedantoj kaj superintendanttoj, la laboristinoj havis nenian rifuĝejon.

Nun la leĝo de la Popola Respubliko de Ĉinio kondiĉas ke "virinoj devas ĝui rajtojn egalajn al"

(daŭrigo sur p. 104)

# Eterne Glora Batalanto de Internaciismo

Ĉen Ŝing-hua



I. Estas nove masonita tombo sur la suda mont-deklivo de iu vilaĝo en norda Koreio. Revoluciaj armeanoj kaj popolanoj, preterpasante la tombon, ĉiuj senescepte en respekto venis funebri tiun ĉi entombigitan en la korea tero batalanton de internaciismo—la martiron Lo Ŝeng-kiaŭ de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj.



II. Lo Ŝeng-kiaŭ estis naskita en malriĉa kamparana familio en Tungze-vilaĝo, Zeŝan-distrikto, Sinhua-gubernio, Hunan-provinco de Ĉinio. Li estis eminenta membro de la Ĉina Novdemokratia Junula Ligo kaj funkciis kiel skribisto en iu rekognoska taĉmento de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj. En laboro li ĉiam estis energia kaj respondecema kaj ne timis malfacilon. En lia postlasita taglibro estas de li verkita mallonga poemo:

*Ne haltu eĉ minuton eĉ mia kadavro,  
Se mi estos trafita de kugloj invadantaj;  
Sed rapidu antaŭen kun kuraĝo,  
Por venĝi la koreanojn kaj kamaradojn mortintajn!*



III. En la mateno de la dua de januaro en la kuranta jaro, Lo Ŝengkiaŭ iris preter rivero post gimnastika ekzercado. Tiam, sur la riverglacio estis 4 koreaj junuloj ĝoje glitkurantaj. Unu el ili, nomata Cuj Jeng, neatendite enfalis en glacian kavon profundan pli ol 8 futojn, kaj la aliaj tri junuloj ekploris pro timo.



IV. Ekvidante ke iu enfalis en la riveron, Lo Ŝeng-kiaŭ tuj tien rapidis demetante de si la vatitajn vestojn.



V. Lo Ŝeng-kiaŭ alvenis al la glacia kavo kaj ensaltis en ĝin kun brava sinoferemo por elsavi la dronantan korean junulon.




VI. En frostega vetero je 20 gradoj sub nulo, li tutkorpe trempiganta en la glacia akvo, du fojojn palpe serĉis por Cuj Jeng, tamen ne sukcesis. Li eletendis sian kapon el la akvo, rapide enspiris kaj denove profundigis en la akvon. Nur ĉifojn, la trian fojon, li sukcesis trovi Cuj Jeng-on. Kaj kelkfoje li subtenante levis Cuj Jeng-on el la akvo, sed ĉar la glaci-tavolo ĉirkaŭ la kavo estis tro maldika, kiam Cuj Jeng ĵus surrampis sur la glaci-tavolon, ĝi tuj dispeciĝis kaj profundigis kaj Cuj Jeng denove enfalis en la akvon.



IX. Posttagmeze de la sama tago, la loĝantoj, unuj post aliaj alvenis al la garnizonejo de la trupo kaj fojon post fojo petante diris al la respondeculo de la trupo:

“Kamarado Lo mortis por savi nian infanon, ni al vi petas, bonvolu doni al ni lian korpon ke ni lin entombigu en la plej solena funebra ceremonio de la korea popolo!”



X. Dum la entombigo de l' martiro Lo Ŝeng-kiaŭ, denove la loĝantoj rondstaris ĉirkaŭ la tombo-kavo por lastfoje rigardi la aspekton de la karulo. Ĉiuj ĉeestantoj ploregante enterigis la martiron per larmo kaj tero. La savita junulo Cuj Jeng antaŭ la martira tombo ĵurpromesis al la mortinto ke li decidis nepre aliĝi al la Korea Popola Armeo por venki la Usonajn invadantojn kune kun la Ĉinaj Popolaj Volontuloj.





VII. Tiam, la sango en la korpo de Lo Ŝeng-kiaŭ jam frostiĝos, li aspektis bluite ruĝa sur la tuta korpo kaj mortpala sur la vizaĝo, estis ja lacega kaj senforta; sed por nepre elsavi la korean junulon, li denove forte enspiris kaj profundigis ĝis la rivera fundo. Sur la akraj ŝtonetoj li staris kaj per sia kapo kun la lasta, tuta forto levis Cuj Jeng-on el la akvo, ĝuste kiam la barbiro de la trupo, informiĝinte pri la afero, tuj rapidis al la okazejo kun stango de telefono, per kio Cuj Jeng estis elsavita.



VIII. Sed la sinoferema kamarado Lo Ŝeng-kiaŭ jam neniam aperigis el la akvo, kaj estis puŝita de la torento sub malproksiman glacitavolon. La barbiro, kiu ne sciis naĝi, flugrapide rekuris por helpo. Sed kiam kamaradoj alvenis, dispecigis la glacitavolon kaj lin elakvigis, li jam ĉesis spiri. La pli ol 20 familioj da koreaj loĝantoj en la vilaĝo ĉiuj alrapidis kaj starante ĉirkaŭ la kadavro de la martiro ploregis kvazaŭ je perdo de karulo.



XI. Por memori la martiron Lo Ŝeng-kiaŭ, la vilaĝanoj decidis garantii pli frue pagi la impostan grenon, kaj de nun pli profunde plugi, pli atente prilabori kaj pli multe rikolti, por subteni la fronton kaj gajni pli grandan venkon en la kontraŭinvada milito.



XII. Kiam la rakonto pri la heroa okazaĵo, ke la eterne glora batalanto de internaciismo Lo Ŝeng-kiaŭ sinoferis por savi la dronantan korean junulon Cuj Jeng, disvastiĝis en la trupoj de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj kaj la Korea Popola Armeo, la batalantoj unuanime decidis lerni la grandan spiriton de internaciismo kaj noblan karakteron de la revolucia armeano kaj ĵuris venki la Usonajn invadantojn por venĝi la korean popolon kaj la mortintajn kamaradojn.

Elĉinigiis Zekun

# Raporto de Kuo Mo-jo al la Monda Packonsilo pri la Krimago de Usono

En la unua kunsido de la Plenuma Buroo de la Monda Packonsilo Vicprezidanto Kuo Mo-jo de la Monda Packonsilo je la 29-a de marto faris raporton en la nomo de la ĉina delegacio pri la bakterimilita krimago de la Usona imperiismo. La raporto tekstas jene:

Sub la standardo de la Unuigitaj Nacioj la Usonaj agresantoj armite intervenas kaj kruelege detruas kaj masakras en Koreio jam dum preskaŭ du tutaj jaroj. Pro siaj malvenkoj en la milito kaj la premdevido de la publika opinio de la mondo, kvankam ili akceptis antaŭ naŭ monatoj intertraktadon pri armistico, tamen ili ankoraŭ tute ne havas veran volon por pace solvi la korean problemon. Per ĉiaj senraciaj rimedoj ili prokrastas kaj malhelpas la armistitan intertraktadon, kaj, antaŭ du monatoj, ili eĉ malhome komencis uzi bakteriajn armilojn.

Ekde la 28-a de januaro ĉi-jare, la Usonaj agresantoj komencis grandkvante disŝutadi bakteriportantajn insektojn kaj aliajn venenajn objektojn en gravajn urbojn kaj sur gravajn vojojn en la fronto kaj postfronto de Koreio, de la oriento de Kajsung ĝis Pukhangang-Rivero. De la 29-a de februaro ili eĉ disŝutadis bakteriportantajn objektojn en la Nordoriento de Ĉinio. La suferigitaj regionoj ampleksas la ses provincojn Liaŭtung, Liaŭsi, Sungkiang, Kirin, Hejlungkiang kaj Ĵehol, la municipalon Mukden kaj aliajn 43 guberniojn kaj municipojn. Kaj la 6-an kaj 7-an de marto ili disŝutis la samon en la apudon de Cingtaŭ-municipalo en Ŝantung-Provinco.

Inter la pli ol 35 specoj da objektoj disŝutitaj de la Usonaj agresantoj, la ĉefaj estas muŝoj, puloj, moskitoj, pedikoj, iksodoj, sablomuŝoj, griloj, risortvostuloj, akridoj, musoj, putriĝinta viando, mortintaj fiŝoj, kotono, arbfolioj, kokplumoj, ktp. Multaj insektoj neniam antaŭe troviĝis en la suferigitaj lokoj, kaj en la nuna temperaturo ankaŭ estas neeble por ili eloviĝi. Post ekzameno de bakteriologoj kaj entomologoj estas pruvite, ke multaj el la insektoj kunportas mortigajn infektajn bakteriojn de pesto, ĥolero, tifo, k.a.. La malamikoj disŝutis la bakteriojn kelkfoje sur la batalfronto per speciale fabrikitaj obusoj, sed ĝenerale per aeroplanoj ili disŝetis bakteriajn bombojn aŭ rekte subĵetis bakteri- aŭ virus-portantajn musojn, mortintajn fiŝojn, putriĝintan viandon, ktp. Kelkfoje ili disŝetis la infektitajn insektojn kune kun propagandiloj.

Nun en kelkaj regionoj en Koreio kaj Ĉinio jam disvastiĝas grandskala kontraŭ-epidemia movado por ekstermi la bakteriojn. Medicinaj, veterinaraj kaj agronomiaj fakuloj ĉiuj mobiliziĝis, kaj la viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj junuloj de la vasta popolamaso ĉiuj partoprenis kun senlima indigno la bataladon kontraŭ la bakteria milito por rapide ekstermi la venenajn insektojn kaj bakteriojn disŝutitajn de la Usonaj trupoj por malebligi la kreskon kaj disvolviĝon de epidemioj.

Tiu ĉi malhoma krimago de la Usonaj agresantoj estas senprecedenca en la historio. Dum la dua mond-

milito eĉ Hitler kaj Mussolini ne uzis bakteriajn armilojn. Kvankam ilin uzis la japanaj imperiistoj en Ĉinio, tamen ne tiel grandskale kiel hodiaŭ Usono uzas. Se la krimago de Usono je uzado de bakteriaj armiloj ne estas tuj ĉesigita per efika rimedo, ĝi ankoraŭ pli grandskaliĝos, kaj la katastrofo kiu falis hodiaŭ sur la ĉinan kaj korean popolojn, morgaŭ certe falos sur la pacamajn popolojn de la tuta mondo.

Antaŭ tia nedisputebla fakto la Usonaj aŭtoritatoj, kiel Acheson kaj Ridgway, tamen ankoraŭ daŭrigas siajn sofismon kaj neadojn. La 4-an de marto Acheson deklaris, ke la trupoj de la Unuigitaj Nacioj ne uzis kaj ankaŭ ne uzas ian ajn bakterian armilon. Sed la fakto diras, ke la Usona registaro ne nur uzas bakteriajn armilojn nun, sed ankaŭ uzis antaŭe.

La preparadon pri bakteria milito komencis la Usona registaro jam antaŭ longe en la fino de la jaro 1941. La 4-an de januaro 1946, je la konsento de la Usona registaro, G. W. Merck, la estinta prezidanto de la Biologia Milita Komitato de la Ĥemia Korpuso de Usona Armea Ministerio publikis tre detalan raporton pri la grandskala kaj sistema esplorado de Usono pri bakteria milito, per kiu esplorado la Usonaj fakuloj de bakteria milito ja ĉiam paradis. En la somero de 1949 la Usona registaro prenis la eskimojn kiel eksperimentaĵon por iliaj bakteriaj armiloj kaj kaŭzis en la eskima regiono disvastiĝon de bubona pesto. Tio estas fakto de ĉiuj konata.

Por entrepreni bakterian militon en la Oriento la Usona registaro ankaŭ delonge faris preparadon en intima kunlaboro kun japanaj krimuloj de bakteria milito pri kiu ili havas krimajn spertojn. En la jaro 1946 MacArthur sendis 18 selektitajn japanajn krimulojn de bakteria milito labori en la bakterimilitaj bazoj en Maryland, Mississippi kaj Utah de Usono por utiligi iliajn krimajn spertojn. La 13-an de aprilo 1951 la ĵurnalo "New York Times" raportis ke establiĝis bakteriaj esplorstacioj en Japanio, kaj ambaŭ MacArthur kaj lia sekvanto Ridgway energie instigas la daŭran esploradon kaj produktadon de bakterioj en Japanio. Samjare la 5-an de decembro raportis depeŝo de la inform-servo Telepress el Rangoon: Du anonimaj oficistoj de Usono malkaŝis ke Ridgway jam sendis al Koreio por entrepreni bakterimilitajn laborojn la japanajn krimulojn de bakteria milito kiujn li bredis, nome Ŝiro Iŝii, la estinta Ĝeneralleŭtenanto de la Medicina Servo de la Japana Armeo, Ĵiro Ŭakamacu, la estinta Generalmajoro de la Veterinara Servo, kaj Masaĵo Kitano.

La celo de bakteria milito estas krei en la malamikaj regionoj epidemiojn en granda skalo por rezultigi grandan masakron. Sed por kaŭzi grandskalan disvolviĝon de epidemioj, ne sufiĉas la nura disŝutado de bakterioj. Necesas kompreni la fiziologiajn kondiĉojn kaj karakterojn de la homoj. Tio estas ĝuste la krima sperto akirita de Ŝiro Iŝii en sia esplorado pri bakteria milito en Ĉinio kaj estis konfesita de Ĝeneralleŭtenanto Kajicuka Rjuĵi, la estinta Medicina Ad-

# La Interhelpa Grupo de Han En sur la Vojo de Agrikultura Kooperativo

Ĉang Siaŭ-hu

Je la fino de la jaro 1951, mi vizitis Han En, vastekonatan tutlandan agrikulturan labor-modelon de la Nordorienta Regiono de Ĉinio, kaj la interhelpan grupon sub lia gvidado, ĉe Paŭ-an-vilaĝo, Ĉiaŭho-gubernio, Kirin-provinco.

Por Paŭ-an-vilaĝo, estas pli nova signifo en la adiaŭo al la jaro 1951 kaj bonvenigo al 1952. Laŭ la propraj vortoj de Han En mem, "la forpaso de unu jaro signifas, ke ni unu paŝon pli proksimiĝas al kolektivigo de agrikulturo, al la bona vivo de socialismo. Nun, nia tuta grupo investos niajn agrojn kiel akciojn kaj formas agrikulturan produkt-kooperativon, altigante unupaŝen plu la originalan interhelpan grupon. Tio estas la dediĉo de nia Paŭ-an-vilaĝo por adiaŭi la jaron 1951 kaj bonvenigi 1952."

Vere, la vizaĝo de Paŭ-an-vilaĝo plibriliĝas, kaj la vivo de la popolo pliboniĝas jaron post jaro. Antaŭ la agra reformo, tiu ĉi vilaĝo estis vaste konata "vilaĝo de sen-havuloj," kie la tuta loĝantaro konsistis el 21 familioj de malriĉaj kamparanoj, kiuj kulturis plejparte la teron en la posedo de bienuloj de aliaj vilaĝoj. Nun, inter la 24 familioj en la vilaĝo, krom la tri nove alirintaj, dek kvin familioj jam leviĝis al la stato de bonhava mezkamparano kaj ses familioj al tiu de mezkamparano. La fakto ke la produktado kaj vivo de la vilaĝanoj de Paŭ-an faras vertikalan leviĝon estas klare videbla el la ŝanĝo de la formo de labor-organizado. En 1947, la laborfortoj de Paŭ-an-vilaĝo organiziĝis. Ekde tiam la organizaj formoj progresiĝis de interhelpa grupo al tutvilaĝo interligita grupo, de sezona interhelpa grupo por interŝanĝo de homforto kaj bestforto al tutjara konstanta interhelpa grupo karakterizita per kunligo de agrikulturo kaj flankokupoj kaj divido de laboro kaj okupoj. Nun, ekde 1952, ili sukcese iras sur la vojo de agrikultura kooperativo.

Kiam mi atingis Paŭ-an-vilaĝon, la guberniestro, k-do Lju Ĉuan-jung, jam estis tie por kelkaj tagoj; li mem gvidis kaj konkrete helpis la interhelpan grupon de Han En en fondo de kooperativo. Dank' al la forta gvidado kaj pacienca eduko de la Partio kaj la Popola Registaro, la interhelpa grupo de Han En estas tute preta laŭ materia kondiĉo kaj laŭ pensoj de la grupanoj. Tial, la laboro investi agroakciojn iris glate kaj akiris kontentigan rezulton. Laŭ la principo "aliĝo memvola kaj ekŝiĝo libera", la tuta grupo de 24 familioj senescepte subtenas la fondiĝon de la agrikultura produkt-kooperativo; ĉies agro, ŝarĝbrutoj, kaj paŝtbrutoj fariĝis akcioj de la kooperativo, t. e. komunaj proprajoj de la tuta grupo.

La akcioj estas en tri unuoj: agroj, ŝarĝveturiloj kaj ŝarĝbrutoj, kaj paŝtbrutoj. Tiuj ĉi unuoj estas sub unueca gvidado, sed iliaj ekonomiaj profitoj estas aparte kalkulataj; iu ajn unuo uzante ion de alia unuo devas pagi por ĝi. Por eviti ĝenon al la unueco en kulturado, tiuj kiuj volas retiriĝi ne ricevos la originalan terpecon, sed samgrandan terpecon laŭ ĝia klasigo dum aliĝo. Tiuj kiuj volas retiri siajn akciojn en veturiloj kaj ŝarĝbrutoj aŭ paŝtbrutoj ankaŭ ne ricevos la originalajn objektojn, sed estas rekompencitaj per mono aŭ

varoj laŭ la prezoj. Ĉiu familio de la tuta grupo rezervas duon-muon da tero por legom-kulturado, kaj la ceteraj partoj ĉiuj fariĝas akcioj. Krom la reguloj pri aliĝo kaj ekŝiĝo, oni ankaŭ stariĝis pri provan sistemon en la divido de dividendo: la normala produktkvanto po muo estas fiksita je kvin dekalitroj da maizo kaj post la pago de publika greno (agrikultura imposto) tri dekonoj de la restaĵo estas dividataj laŭ agroakcioj kaj sep dekonoj laŭ kontribuo de laborforto; se la produktkvanto superas kvin dekalitrojn, la superproduktaĵo estas dividata en du partojn: kvin dekonoj por rezerva fonduso, la aliaj kvin dekonoj por dividiĝi laŭ kontribuo de laborforto; la poentoj de ambaŭ vira kaj virina laboro estas decidata laŭ sperteco kaj efikeco. El la enspezoj el ŝarĝveturiloj, ŝarĝbrutoj kaj paŝtbrutoj krom la pagoj por homlaboro kaj fojno, 5 procentoj estas por komuna fonduso kaj la restaĵo dividata laŭ akcioj.

Vidante la novajn fenomenojn en Paŭ-an-vilaĝo, Han En ekscite diris al mi: "Starigo de agrikultura produkt-kooperativo altigas unu paŝon nian interhelpan grupon. Tiu estas la vojo elmontrita de la Partio kaj la Popola Registaro por helpi al ni kamparanoj iri de malriĉeco al prospero, al disvolviĝo de produktado. Tiel, ni povos produkti pli laŭplane, pli bone altigi nian agrikulturan teknikon kaj pli bone manifesti la kapablon kaj aktivecon de ĉiu grupano en produktado. Tiel, ni ne plu estas devigataj iri la malnovan vojon de individua ekonomio, la malnovan vojon de egoismo, ekspluatado. La progreso de Paŭ-an-vilaĝo de interhelpa grupo al produkt-kooperativo markas la direkton de disvolviĝo de agrikultura produktado.

Estas firmaj kaj solidaj materia kaj ideologia fundamentoj dank' al kiuj la interhelpa grupo de Han En ekmarŝis sur la vojo de agrikultura kooperativo.

Sendube, la vivo de la popolanoj en Paŭ-an-vilaĝo multmulte pliboniĝis ol antaŭ la liberigo. En la vortoj "en ĉies poŝo estas mono; en ĉies ŝranko novaj vestoj," oni povas imagi kiel la vilaĝanoj vivas. Kio plej stimulantanta estas tio, ke la materialoj por produkto plimultiĝis senĉese. Nun, la tuta grupo posedas dudek kvar fortajn ĉevalojn, naŭ ŝarĝveturilojn kun kaĉukaj radoj, tutan kompletan de novstilaj kulturiloj tirataj de ĉevaloj. La kulturiloj duobliĝis ol antaŭ la liberigo. Ili ankaŭ estas pretaj investi la komunan rezervan fonduson de la interhelpa grupo 120,000,000 juanojn por disvolvi produkton en 1952. En la sama plano ili ankaŭ preparas fosi du kanaletojn por defluigo de akvo, kulturiloj du hektarojn da akvo-kampoj kaj sep ĝis ok hektarojn da sekaj kampoj, aĉeti unu sark-maŝinon por ebena tero kaj unu fojndistranĉan maŝinon, dek ok bovojn (ĉe ili nun estas sep) kaj krome, investi du dek milion dolarojn por starigi brikbakejon. El la materiaj kondiĉoj kaj la plano surbaze de kolektiva disvolviĝo de produktado oni povas vidi ke la vojo sur kiu la interhelpa grupo de Han En iras al agrikultura kooperativo estas firma kaj solida.

Nova ideologio, nova laborstilo lumigas la brilan vojon sur kiu la interhelpa grupo de Han En marŝas

# HALTIGU LA KRIMAGOJN DE USONAJ IMPERIISTOJ!

Esperantistoj! Pacamantoj!

La Usonaj invadantoj daŭre faras la plej frenezan, la plej barbaran kaj la plej kruelan bakterian militon en Koreio, jam ĝin etendis en Ĉinion, ripete invadis la teritorian aeron de nia Nordoriento, grandkvante disĵetante bakteriportantajn insektojn kaj tuj poste faris la saman krimagon en la apudo de Cingtaŭmunicipalo, Ŝantung-provinco.

Kiel ajn Acheson kaj Truman neas siajn krimagojn, dirante ke ili neniam uzis bakteriajn armilojn, tamen ili ne povas diri eĉ unu vorton por kondamni la uzadon de bakteria armilo nek povas kaŝi siajn krimagojn. La puloj, araneoj, muŝoj kaj aliaj insektoj portantaj infektajn bakteriojn trovitaj en Koreio kaj la teritorio de Ĉinio ja ne falis de Marso aŭ la luno, sed estis ĵetitaj el Usonaj aeroplanoj kaj portataj en bomboj kaj ujoj Usone fabrikitaj.

Ekde la komenco, malkaŝiĝis la plej kruela naturo de la invada milito en Koreio. Trovinĉe nenian elirejon el sia fiasko, la Usonaj imperiistoj aŭdacas entrepreni grandskalan bakterian militon kian eĉ Hitler-faŝistoj ankoraŭ ne kuraĝis. La celo de bakteria milito estas ne nur detruiri la militan forton, sed des pli por buĉi pacajn loĝantojn. Usona militisto eĉ senhonte diris, ke se homoj mortos de malsano, ĉiuj fabrikoj kaj domoj sendifekte falos en la manojn de la venkintoj. Do la nova atenco entreprenata de la Usonaj imperiistoj minacas ne nur koreojn kaj ĉinojn, sed la tutan homaron.

Grandkvante uzante bakteriajn armilojn, la Usonaj imperiistoj ne nur revas per tio venki la popolajn trupojn de Ĉinio kaj Koreio, multnombre ekstermi koreajn popolanojn kaj plivastigi militon en la Ekstrema Oriento; sed ili ankaŭ celas timigi la liberamajn popolojn de diversaj landoj kaj paralizi ilian volon por kontraŭstari rabeman impreiismon kaj batalakiri liberon kaj nacian sendependecon.

Estas danĝere, se ni tro taksas la minacon de bakteria milito aŭ se ni paraliziĝas antaŭ la timigo de la Usonaj imperiistoj, ĉar ambaŭkaze ni restos senfaraj kaj senarmigitaj antaŭ la bakteria milito. Tial ni popoloj de la tuta mondo devas unuflanke firme kaj vigle nin gardi kontraŭ la bakteria milito kaj unuanime leviĝi por haltigi la krimagojn de la Usonaj

banditoj kaj aliflanke fidi en nia scio de scienco, nia forto de organizado kaj nia unueco tra la tutmonda pactendaro por fiaskigi la bakterian militon.

Se nur ni firme kaj vigle bone faras antaŭgardan laboron, certe ni povas venki kontraŭ bakteria milito. Japanio iam uzis bakteriajn armilojn en Ĉinio, tamen la ĉina popolo finfine venkbatis la japanajn banditojn sub la gvidado de la Ĉina Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ Ze-tung. Bakteria milito ne povis savi la japanajn banditojn el sia malsukceso en la pasinteco, nek povas ĝi savi la Usonajn nun. La unuigita agado de pacbatalantoj de diversaj landoj jam malhelpis la uzon de atomarmiloj, kaj ĝi certe povas malhelpi la kruelajn krimagojn de la Usonaj banditoj uzi bakteriajn armilojn. Tutmondaj pacamaj popoloj! unuanime leviĝu por haltigi ĉi tiun grandegan krimon! Por paco batalantaj esperantistoj! unuanime leviĝu por severe kondamni la malhomajn krimagojn de la Usonaj imperiistoj, kies sangavidaj manoj se ne tuj haltigataj detruos la tutan mondon!

Ĉina Esperanto-Ligo

Peking, la 14-an de apr. 1952

---

## Raporto de Kuo Mo-jo . . .

(daŭrigo de p. 91)

En la homa historio la homaro suferis multajn katastrofojn. Sed en sia batalado kontraŭ ĉiuj katastrofoj la homaro ĉiam fine venkis. Ni forte kredas ke ĉiuj malhomaj agoj de la Usonaj imperiistoj ankaŭ estas venkeblaj kaj certe estos venkitaj.

La ĉina popolo tute subtenas la alvokon de Joliot-Curie. Niaflanke ni estus ĝojaj, se la Monda Packonsilo iniciatus vastan internacian komitaton konsistantan el justaj, honestaj kaj memstaraj homoj kaj partoprenatan de aŭtoritataj sciencistoj kaj homoj kiuj ne partoprenis nian movadon sed sincere subtenas la aferon de paco kaj staras sur la starpunkto de humaneco. La tasko de la Komitato estus kolekti la amasojn de faktoj fare de la Usonaj trupoj en Koreio kaj Ĉinio, koncerne la rompon de la internacia konvencio de Genevo en 1925, kiu senkondiĉe malpermesas la uzon de bakteriaj armiloj.

Ni ankaŭ subtenus la iniciaton de la Monda Packonsilo pri kunvoko de internacia reprezentanta kunveno partoprenata de homoj kaj organizoj kun diversaj vidpunktoj kaj kredoj, kiu alvokos al ĉiuj konsciencohavaj homoj klopodi senkondiĉe malpermesi la uzon de bakteriaj armiloj kaj kondamnos la Usonajn agrezantojn kiuj rifuzis sankcii la Ĝenevan Protokolon de 1925 k malhome uzadas bakteriajn armilojn en Koreio kaj Ĉinio.

# La Hejma Merkato de Ĉinio Vigligas

## KOMERCO INTER URBOJ KAJ VILAĜOJ EN 1951

Rezulte de la eblecoj malfermitaj de la novdemokratia ekonomia sistemo kaj de la aktiva plivigligo fare de la Popola Registaro, la interna komerco de Ĉinio nun atingas la plej altan nivelon en historio. Precipe la interfluo de varoj inter urboj kaj vilaĝoj, la interŝanĝo de industriaj produktaĵoj por la agrikulturaj interne de la lando, jam disvolviĝas ĝis senprecedenca volumeno.

Kotono provizas bonan ekzemplon por tio. En 1946, la kotona importado de Ĉinio estis egalvalora al 75 procentoj de ĝia propra produkto. En 1951, nur du jarojn post liberigo, la lando fariĝis preskaŭ memsufiĉa en kotono, kaj la sumoj pagitaj de ŝpinoj por sia krudmaterialo iris al ĉinaj kamparanoj anstataŭ flui eksterlanden.

Plie, la akcesoraj produktaĵoj de ĉina kampara ekonomio (rikoltaĵoj aliaj ol grenoj kaj kotono, kaj diversaj manfaritaĵoj) atingas urbajn industriojn kaj konsumajn merkatojn en ĉiam kreskanta kvanto.

En la pasinteco, ilia plejparto estis ĉu konsumita en la kamparanaj hejmoj, kelkfoje simple kiel hejtaĵoj, aŭ tute malŝparita, kiel en la kazo de fruktoj kiuj ne estis kolektitaj kaj putris pro manko de konsumantoj. Tamen en 1951, 80 procentoj de tiaj produktaĵoj estis venditaj landskale, kaj la cifero de kelkaj regionoj estis 90-95 procentoj. Per la mono el ili ricevita, ĉinaj kamparanoj povis aĉeti ĉiujn specojn de urbefaritaj industriaj varoj. Nekompleta statistiko montras ke la kamparana aĉetpovo de la tuta lando estis 30 procentojn pli alta en 1951 ol en 1950. La agrara reformo estis la ĉefa faktoro de ĉi tiu plialtiĝo, tamen plivigligita vendado de akcesoraj produktaĵoj ankaŭ ludis gravan rolon.

Sin bazante sur enlandaj mineralaĵoj, karbo kaj aliaj provizoj, la peza industrio de Ĉinio en kelkaj fakoj jam rompis la pasintajn rekordojn en sia produktado; nun ĝi povas doni pliiĝantan servon al la kamparo en la formo de instrumentoj, transporto kaj sterkoj, kaj al la malpeza industrio en la formo de diversaj specoj de maŝinoj. Ekzemple, la Nordĉinia regiono nuntempe produktas sep-okoble tiom da ŝtalo kiom ĝi produktis en sia plej alta periodo antaŭmilita.

Ĉi tiu rapida kresko venigis situacion antaŭe nekonatan en Ĉinio. La proporcio de kreskado de baza industrio nun superas tiun de komerco—kaj komerco devas kuratingi por ke industriigo estu glate efektiva. Komerco estas plivigligata ĉiumaniere, ne por ebligi pli multajn makleristojn gajni profiton, sed por grandigi, simpligi kaj rapidigi la interŝanĝon de komercaĵoj por la bono de la popolo kaj ilia ekonomio. La vastaj merkatoj kaj la fontoj de krudmaterialoj kiujn ĝi kontaktas interne de la lando pli ol nuligas la efikojn kiujn la imperiistoj esperis el sia provo embargi Ĉinion. Ĝi ankaŭ ebligas eksportajn varojn por eksterlanda komerco kun amikaj landoj kiel la Sovetunio kaj la popoldemokratiaj landoj, de kiuj Ĉinio akiras maŝinojn kaj multajn aliajn esencaĵojn por industriigo kontraŭ krudmaterialoj sur justa kaj egala bazo. La disvolviĝo de urba-kampara komerco estas unu ekzemplo de la fakto kiel la

“embargo” fakte fariĝis alia kaŭzo por plirapidigi la antaŭeniron al socialismo per industriigo.

### Bonoj al la Vilaĝoj

Jen estas kelkaj ekzemploj de la bonoj jam nun evidentaj pro la plivigligita interfluo de varoj inter urbo kaj kamparo atingita sub la komerca politiko de la Popola Registaro.

Kiangsi-provinco jam de longe povis produkti multe da paperpulpo kiu estis antaŭe produktita nur por manfarita papero. Ŝanhajo havas modernajn paperfabrikojn, sed ili ĉiam importis pulpon de eksterlando. Nun Kiangsi pliiĝis sian produkton por la uzo de la Ŝanhaja paperindustrio, kiu ne plu bezonas aĉeti fremdlandan materialon por plene funkciadi. Tiel pliriĉiĝas samtempe Kiangsiaj kamparanoj, Ŝanhajaj laboristoj kaj la tuta lando pro la interŝanĝo.

Iu malgranda vilaĝo en Sudĉinio—Kangho, Hojuangubernio, Kuangtung-provinco—produktas bonan terebintinon, taŭgan por miksi farbojn kaj vernizojn kaj por medicinaj uzoj. En la pasinteco, aĉetantoj por la Usonaj imperiistaj firmoj aĉetis la krudan produktaĵon de la kamparanoj per tiaj malaltaj prezoj ke ili vivis duonmalsate, transportis ĝin al Usono kie ĝi estis rafinita kaj resendis la elfaritan produktaĵon al Ĉinio por vendo. Nun la terebinto de Kangho jam trovis vastan enlandan merkaton, sekve aferoj aliĝas. Lastjare, el la 5,100 malriĉaj kamparanaj familioj tieaj, 2,500 atingis la pozicion de meza kamparano. Novaj domoj kaj pli multaj brutoj estas videblaj en la vilaĝo. La nombro de geedziĝoj multiĝis. Ĉiuj ĉi tiuj ŝanĝoj povas okazi pro tio ke la kamparanoj ne nur regajnis sian teron per agrara reformo, sed ili ankaŭ povas igi sian kromproduktaĵon profitdona.

La pliiĝita urba-kampara komerco ege kontribuis al la disvolviĝo de industrio kaj komerco en la urboj. Multaj fabrikoj ne nur revivigis, sed multe superis sian plej bonan antaŭan produkton. Sole en Ŝanhajo, 1,596 novaj industriaj entreprenoj komencis laboron en 1951. En la sama periodo, 3,278 novaj komercaj entreprenoj malfermiĝis por negoco.

Pekino havis 3,543 pli multe da butikoj kaj fabrikoj en aprilo, 1951 ol je la komenco de la jaro. Vendoj de ŝtofo en Pekino 250 procente pliiĝis kaj vendoj de faruno 59 procente dum la sama periodo.

### Ŝtataj Komercaj Organizoj Gvidas

Kiel la disvolviĝo de urba-kampara komerco estas ebligita? La ĉefan rolon en tio ludas la ŝtataj komercaj organizoj, kiuj funkcias ne nur en la urbegoj, sed ankaŭ en vilaĝoj kaj vilaĝetoj kaj la plej malproksimaj regionoj loĝataj de naciaj minoritatoj. Apartaj ŝtataj komercaj organizoj ekzistas por negoci grenon, ŝpinaĵojn kaj ŝtofon, ekipaĵojn por produktantoj, konstrumaterialojn, kamparajn kromproduktaĵojn, salon. mineralojn, teon kaj diversajn konsumatajn objektojn. Kvankam iliaj okupoj de negocado estas malsamaj, ili ĉiuj servas al unu celo, disvolvi la enlandan komercon kaj pliiĝi la cirkuladon de varoj inter la urbo kaj la kamparo. Kune ili aĉetas la pli grandan parton

de la agrikulturaj produktaĵoj de Ĉinio, tenas glata la fluon de krudmaterialoj al industrio kaj zorgas ke la kampara popolo estu kontentige provizata per urbefaritaj komercaĵoj.

La rapida kresko de komerco fare de la ŝtataj komercaj organizoj en 1950-51 estas grafike montrata per la sekvanta parta tabelo por la regiono de Centrasuda Ĉinio.

### Negoco de Ŝtataj Komercaj Kompanioj en Centrasuda Ĉinio

(Negoco de 1950=100)

	Aĉetita	Vendita
Greno .....	452.4	322.68
Ŝpinaĵo .....	150.0	155.48
Ŝtofo .....	616.5	239.3
Diversaj porkonsumaj objektoj ....	1,127.7	484
Karbo .....	254.4	143.8
Salo .....	—	179.13
Petrolaj produktaĵoj .....	—	202.23

La ŝtata komerca reto etendiĝas ĝis la plej foraj lokoj. Lastjare, ĉirkaŭ 200 branĉoj kaj pli ol 100 agentejoj estis starigitaj en la naciminoritataj regionoj en Sudokcidenta Ĉinio kaj proksimume 300 inter la naciaj minoritatoj en la Nordokcidento. Kontraste kun la pasinteco kiam ruzaj komercistoj konstante eltrompadis la produktaĵojn de la minoritatoj kaj reakciaj oficistoj rekte ilin prirabadis, komerco estas nun plenumata sur justaj kondiĉoj kaj estas forta faktoro por plibonigi ilian vivon.

### Graveco de Kooperativoj

Unu el la ĉefaj metodoj de negocado kun la multmilionia kamparanaro estas per la kooperativoj, kiuj estas multe pli multnombraj ol la ŝtataj komercaj kompanioj kaj kunlaboras kun ili por disvolvi enlandan komercon. La kooperativoj kolektas krudmaterialojn en la kamparo por la bezonoj de la urba industrio kaj reportas de la urboj fabrikitaĵajn varojn al la vilaĝoj. Ambaŭ la membroj kaj nemembroj profitas el ĉi tiuj agadoj. Antaŭ ol estiĝis kooperativoj, la kamparanoj devis vendi siajn produktaĵojn malkare kaj aĉeti la fabrikaĵojn kare. Nun ili estas ne plu sub la superrego de fikomercistoj kiuj kutimis ilin ekspluati tiamaniere.

Ĉiun printempon de post la liberigo, la kooperativoj portas modernajn agrikulturajn instrumentojn, disŝprucigilojn, insektomortigilojn, kaj sterkojn al la kamparo. Post ĉiu rikolto ili vendas ŝuojn, ŝtofon, ŝtrumpojn kaj aliajn konsumataĵojn al la kamparanoj kiuj samtempe alportas al ili grenojn, kotonon, teon, tabakon kaj silkon por vendo. Tiele la kooperativo estas la plej granda fokusa punkto por la interfluo de varoj inter urbo kaj vilaĝo.

En la aŭtuno de 1951, sole en Nordĉinio sin trovis 11,000 kooperativoj, kun pli ol 16,550,000 membroj kaj akcia kapitalo atinganta 149,670 milionojn da juanoj. Ĉi tio signifas membran plimultiĝon de 88.99 procentoj kaj kapitalan plimultiĝon de 140.75 procentoj super la antaŭa jaro, 1950.

Dum la sama periodo, pomalgrandaj vendoj de Nordĉiniaj kooperativoj 62 procente pliiĝis kaj iliaj aĉetoj 106 procente.

Artikolo 37 de la Komuna Programo, la fundamenta leĝo de la Popola Respubliko de Ĉinio, difinas ke "Ŝtataj komercaj organizoj devas preni sur sin la

respondecon alĝustigi proponon kaj postulon, stabiligi prezojn de varoj kaj helpi la kooperativojn de la popolo." Estas klare videble el la faktoj ke ĉi tiu leĝo estas transformita en realecon. Kune kun la ŝtataj komercaj organizoj, la kooperativoj fariĝas la ĉefa ponto sur kiu la interŝanĝo de komercaĵoj okazas.

Samtempe, privata komerco ankaŭ plimultiĝas kaj estas protektata. Privataj firmoj estas organizataj speciale por, kaj kontribuantaj al, la urba-kampara interŝanĝado.

### Ekspozicioj Plivigliĝas Komercon

Inter la metodoj per kiuj interna komerco estas plivigliĝata, specialaj ekspozicioj okupas rimarkindan lokon. Dum 1951, 31 ekspozicioj estis okazigitaj en metropolaj, regionaj kaj provincaj centroj. Statistikoj de 21 el ili montras la entutan vizitanton de 10,700,000 personoj. La valoro de negoco ĉe 23 estis 5,220,000 milionoj da juanoj.

Ekonomie, ĉi tiaj ekspozicioj akcelis komercon. Politike, ili plifirmigis la aliancon de laboristoj kaj kamparanoj, konvinkante ilin pri ilia interdependeco kaj klarigante al la centoj da miloj da kamparanoj, kiuj partoprenis, ke la laborista klaso devas gvidi en la alianco. Kulture, ili igis milionojn koni la vastecon kaj riĉecon de sia patrio, donante al ili memfidon ke ĉiuj ekonomiaj atakoj de la imperiistoj povas esti venkitaj kaj ke la konstruado de Ĉinio nepre sukcesos.

Ekzemple, la ekspozicio por Centrasuda Ĉinio impresis ĉiun vizitanton pri la fakto ke ĉi tiu regiono sole havas areon trioble grandan kiel tiu de Japanio kaj loĝantaron egalan al tiu de Usono. Ĝi enhavas la plej grandajn kvantojn da subtere kaŝataj tungsteno kaj antimono de la mondo kaj ankaŭ grandajn kvantojn da zinko, plumbo kaj dektri aliaj mineraloj. Ĝiaj mineralaj riĉaĵoj inkludas diamantojn, marmoron kaj agaton. Ĝiaj fabrikaĵoj inkludas porcelanon de Kiangsi, la plej bona de la mondo.

La Nordĉinia ekspozicio klarigas la riĉecon de tiu granda regiono. En karbo, Ŝansi-provinco sole havas pli ol duonon de la tutlanda konservo. Nordĉinio ankaŭ estas produktejo de kotono, kiu nutras la ŝpinejojn de la tuta lando ke ili ne plu dependas de importaĵoj.

La Nordokcidento havas grandan konservon en oleo, la vivsango de moderna transporto. Ke Ĉinio estas "malriĉa" en petrolo provizo estas mito kiu estas nun kontraŭpruvita.

Novaj fervojoj estas konstruataj, interligante la antaŭe malproksiman internlandon al la riveregoj kaj la marbordo de Ĉinio. En la Sudokcidento, pli ol duono de la Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo, komencita post la liberigo, estas funkcia. En la Nordokcidento, la Tienŝuj-Lanĉoŭa Fervojo estos kompletigita antaŭ la fino de ĉi tiu jaro.

Enlanda komerco helpas pavimi la vojon al industriigo kiu, utiligante la vastajn provizojn de Ĉinio, faros ŝin unu el la plej grandaj produktaj fortoj en la mondo. Ĉi tiu industriigo antaŭenmarŝos kun tia rapideco nek atingebla nek imagebla por la kapitalista mondo, precipe ĉar Ĉinio ne staras sola sed havas la fratan asiston de la Sovetunio kaj la popol-demokratiaj landoj, kun kiuj ŝi formas neapartigeblan tendaron de socialismo, demokratio kaj paco.

Verkis Li Ĉing-jun  
Elĉinigis Ma Dion.

# La Interhelpa Grupo de Han En sur la Vojo de Agrikultura Kooperativo

Ĉang Siaŭ-hu

Je la fino de la jaro 1951, mi vizitis Han En, vastekonatan tutlandan agrikulturan labor-modelon de la Nordorienta Regiono de Ĉinio, kaj la interhelpan grupon sub lia gvidado, ĉe Paŭ-an-vilaĝo, Ĉiaŭho-gubernio, Kirin-provinco.

Por Paŭ-an-vilaĝo, estas pli nova signifo en la adiaŭo al la jaro 1951 kaj bonvenigo al 1952. Laŭ la propraj vortoj de Han En mem, "la forpaso de unu jaro signifas, ke ni unu paŝon pli proksimiĝas al kolektivigo de agrikulturo, al la bona vivo de socialismo. Nun, nia tuta grupo investos niajn agrojn kiel akciojn kaj formas agrikulturan produkt-kooperativon, altigante unupaŝen plu la originalan interhelpan grupon. Tio estas la dediĉo de nia Paŭ-an-vilaĝo por adiaŭi la jaron 1951 kaj bonveniĝi 1952."

Vere, la vizaĝo de Paŭ-an-vilaĝo plibriliĝas, kaj la vivo de la popolo pliboniĝas jaron post jaro. Antaŭ la agra reformo, tiu ĉi vilaĝo estis vaste konata "vilaĝo de sen-havuloj," kie la tuta loĝantaro konsistis el 21 familioj de malriĉaj kamparanoj, kiuj kulturis plejparte la teron en la posedo de bienuloj de aliaj vilaĝoj. Nun, inter la 24 familioj en la vilaĝo, krom la tri nove alirintaj, dek kvin familioj jam leviĝis al la stato de bonhava mezkamparano kaj ses familioj al tiu de mezkamparano. La fakto ke la produktado kaj vivo de la vilaĝanoj de Paŭ-an faras vertikalan leviĝon estas klare videbla el la ŝanĝo de la formo de labor-organizado. En 1947, la laborfortoj de Paŭ-an-vilaĝo organiziĝis. Ekde tiam la organizaj formoj progresiĝis de interhelpa grupo al tutvilaĝo interligita grupo, de sezona interhelpa grupo por interŝanĝo de homforto kaj bestforto al tutjara konstanta interhelpa grupo karakterizita per kunligo de agrikulturo kaj flankokupoj kaj divido de laboro kaj okupoj. Nun, ekde 1952, ili sukcese iras sur la vojo de agrikultura kooperativo.

Kiam mi atingis Paŭ-an-vilaĝon, la guberniestro, k-do Lju Ĉuan-jung, jam estis tie por kelkaj tagoj; li mem gvidis kaj konkrete helpis la interhelpan grupon de Han En en fondo de kooperativo. Dank' al la forta gvidado kaj pacienca eduko de la Partio kaj la Popola Registaro, la interhelpa grupo de Han En estas tute pretaj laŭ materia kondiĉo kaj laŭ pensoj de la grupanoj. Tial, la laboro investi agroakciojn iris glate kaj akiris kontentigan rezulton. Laŭ la principo "aliĝo memvola kaj ekŝiĝo libera", la tuta grupo de 24 familioj senescepte subtenas la fondiĝon de la agrikultura produkt-kooperativo; ĉies agro, ŝarĝbrutoj, kaj paŝtbrutoj fariĝis akcioj de la kooperativo, t. e. komunaj proprajoj de la tuta grupo.

La akcioj estas en tri unuoj: agroj, ŝarĝveturiloj kaj ŝarĝbrutoj, kaj paŝtbrutoj. Tiuj ĉi unuoj estas sub unueca gvidado, sed iliaj ekonomiaj profitoj estas aparte kalkulataj; iu ajn unuo uzante ion de alia unuo devas pagi por ĝi. Por eviti ĝenon al la unueco en kulturado, tiuj kiuj volas retiriĝi ne ricevos la originalan terpecon, sed samgrandan terpecon laŭ ĝia klasigo dum aliĝo. Tiuj kiuj volas retiri siajn akciojn en veturiloj kaj ŝarĝbrutoj aŭ paŝtbrutoj ankaŭ ne ricevos la originalajn objektojn, sed estas rekompencitaj per mono aŭ

varoj laŭ la prezoj. Ĉiu familio de la tuta grupo rezervas duon-muon da tero por legom-kulturado, kaj la ceteraj partoj ĉiuj fariĝas akcioj. Krom la reguloj pri aliĝo kaj ekŝiĝo, oni ankaŭ starigis provan sistemon en la divido de dividendo: la normala produktkvanto po muo estas fiksita je kvin dekalitroj da maizo kaj post la pago de publika greno (agrikultura imposto) tri dekonoj de la restaĵo estas dividataj laŭ agroakcioj kaj sep dekonoj laŭ kontribuo de laborforto; se la produktkvanto superas kvin dekalitrojn, la superproduktaĵo estas dividata en du partojn: kvin dekonoj por rezerva fonduso, la aliaj kvin dekonoj por dividiĝi laŭ kontribuo de laborforto; la poentoj de ambaŭ vira kaj virina laboro estas decidata laŭ sperteco kaj efikeco. El la enspezoj el ŝarĝveturiloj, ŝarĝbrutoj kaj paŝtbrutoj krom la pagoj por homlaboro kaj fojno, 5 procentoj estas por komuna fonduso kaj la restaĵo dividata laŭ akcioj.

Vidante la novajn fenomenojn en Paŭ-an-vilaĝo, Han En ekscite diris al mi: "Starigo de agrikultura produkt-kooperativo altigas unu paŝon nian interhelpan grupon. Tiu estas la vojo elmontrita de la Partio kaj la Popola Registaro por helpi al ni kamparanoj iri de malriĉeco al prospero, al disvolviĝo de produktado. Tiel, ni povos produkti pli laŭplane, pli bone altigi nian agrikulturan teknikon kaj pli bone manifesti la kapablon kaj aktivecon de ĉiu grupano en produktado. Tiel, ni ne plu estas devigataj iri la malnovan vojon de individua ekonomio, la malnovan vojon de egoismo, ekspluatado. La progreso de Paŭ-an-vilaĝo de interhelpa grupo al produkt-kooperativo markas la direkton de disvolviĝo de agrikultura produktado.

Estas firmaj kaj solidaj materia kaj ideologia fundamentoj dank' al kiuj la interhelpa grupo de Han En ekmarŝis sur la vojo de agrikultura kooperativo.

Sendube, la vivo de la popolanoj en Paŭ-an-vilaĝo multmulte pliboniĝis ol antaŭ la liberigo. En la vortoj "en ĉies poŝo estas mono; en ĉies ŝranko novaj vestoj," oni povas imagi kiel la vilaĝanoj vivas. Kio plej stimulantanta estas tio, ke la materialoj por produkto plimultiĝis senĉese. Nun, la tuta grupo posedas dudek kvar fortajn ĉevalojn, naŭ ŝarĝveturilojn kun kaĉĉukaj radoj, tutan kompleton de novstilaj kulturiloj tirataj de ĉevaloj. La kulturiloj duobligiĝis ol antaŭ la liberigo. Ili ankaŭ estas pretaj investi la komunan rezervan fonduson de la interhelpa grupo 120,000,000 juanojn por disvolvi produkton en 1952. En la sama plano ili ankaŭ preparas fosi du kanaletojn por defluigo de akvo, kulturiloj du hektarojn da akvo-kampoj kaj sep ĝis ok hektarojn da sekaj kampoj, aĉeti unu sark-maŝinon por ebena tero kaj unu fojndistranĉan maŝinon, dek ok bovojn (ĉe ili nun estas sep) kaj krome, investi du dek milion dolarojn por starigi brikbakejon. El la materiaj kondiĉoj kaj la plano surbaze de kolektiva disvolviĝo de produktado oni povas vidi ke la vojo sur kiu la interhelpa grupo de Han En iras al agrikultura kooperativo estas firma kaj solida.

Nova ideologio, nova laborstilo lumigas la brilan vojon sur kiu la interhelpa grupo de Han En marŝas



**Ĉang Ŝe-ŝian, membro de la interhela grupo de Han En, ffoje investas sian ĉevalon en la agrikulturan kooperativon.**

por industria produkto, kion la ŝtato nun tre bezonas, la Kompanio de Kamparaj Produktaĵoj nun klopodas tion aĉeti ĉie. Se ni vendus sunflorajn semajn je alta prezo al la ŝtato, ni unuflanke tro profitus el la ŝtato kaj aliflanke ekspluatatus la kamparanajn fratojn kiuj kreskigis la sunflorojn. Kia malhonora ago al la ŝtato kaj al la kamparanaj fratoj!" Poste, neniu plu volis tion fari. En sia disvolviĝo la interhela grupo de Han En tiel senĉese luktas kun la ideo de ekspluato kaj forgesemo pri sia origino, kaj firmigas la kolektivismajn ideologion kaj agsti-

al disvolviĝo. La grupanoj de la interhela grupo profunde spertas la bonon de kunlaboro kaj interhelpo dum la pasintaj kelkaj jaroj en produktado. Ili ankaŭ bone konvinkiĝis pri la avantaĝo en la uzo de novaj kulturiloj, la novaj povas pligi pli profunde, sekve la plantaĵoj povas pli profunde enradikiĝi, kaj kreski pli fortikaj. Se oni uzas la malnovajn kulturilojn, ĉiu hektaro bezonas dudek kvar kaj duonan homlabortagojn kaj dek bruto-labortagojn; se oni uzas novajn kulturilojn, sufiĉas la sama nombro da bruto-labortagoj, kaj dek homlabortagoj. La ŝparita homforto estas uzata en flankokupa produkto kaj havigos al la grupo grandan sumon da enspezo. La kulturita tero de la interhela grupo de Han En lastjare suferis de inundo kaj rikoltis nur malgrandan kvanton da greno, sed la enspezo de flankokupoj sumiĝas je 169 procentoj de la agrikultura produkto. El vivecaj faktoj la interhela grupo de Han En lernis ke egoismo, individua produktado, obstina alteniĝo al la malnovaj kulturiloj, ĉio ĉi estas malkonforma al la novaj socibezonoj. Nur per pli bona organizado la tekniko de kulturado la produktonivelo kaj la vivnivelo povas esti altigitaj.

Surbaze de tia konvinkiĝo, ili ankaŭ kelkfoje venkis la ideon de kapitalisma administrado kaj agoj de ekspluatado. Ekzemple, en la antaŭlasta vintro, la grupo gajnis sumon de kontanta mono el kromokupo kaj iuj el la grupanoj volis aĉeti kaj konservi kvanton da sunfloraj semoj kio estis malkara je tiu tempo kaj post la vintro venigus duoblan aŭ trioblan profiton. Tiam Han En ne aprobis, sed li ne povis eldiri la kialon. Poste, sub la helpo de la Gubernia Komitato Kompartia de Ĉiaŭho-gubernio, li bone komprenis ke tio estas akaparado, kaj fia spekulacio, kio estas tute kondamninda. Tiam sub lia gvido komenciĝis diskutado pri la afero en lia grupo post kio ĉies penso klariĝis. Iuj diris: "Akapari sunflorajn semojn por profito signifas ke ni forgesas pri nia origino. Sunfloraj semoj estas materio

lon de kunlaboro kaj interhelpo.

La popolanoj de Paŭ-an-vilaĝo havas rokfirmantan fidon al sia brila estonteco. Ili decideme respondis al la alvoko de Prezidanto Maŭ, ŝpari kaj pliprodukti, kaj defiis al konkurso ĉiujn aliajn kamparanojn de la Nordoriento. Lastjare, el siaj vintraj flankokupoj ili enspezis kvar dek milion dolarojn, kio donis firman bazon por la grandskala produkto de ĉi tiu jaro. La virinoj de la grupo ankaŭ partoprenis la pliproduktan movadon. Krom partopreno en la produkto, ili garantias ke ili kuiros manĝaĵon laŭ plano kaj ŝparos ĉiumonate naŭdek ĝin-ojn (1 ĝin =  $\frac{1}{10}$  kg.) da rizo kaj cent kvindek faskojn da fajroligno. Han En diris al mi kun plena fido: "Ni certe plenumos la gloran taskon kiun Prezidanto Maŭ donis al ni, ni garantias ke ĉiu muo (1 muo = 6.667 aroj) da tero pliproduktos en 1952 kvar dek ĝinojn da greno." Kiam mi interparolis kun kelkaj kamaradoj de la grupo, iliaj vizaĝoj kaj parolo esprimis grandajn ekscitiĝon kaj decidemon. Parolante pri la estonteco de la agrikultura kooperativo, Han En diris kun ĝojo: "Ni lernos uzi traktorojn kiel la kamparanoj de la Sovetunio, kaj iros la vojon de socialismo.—" Antaŭ ol li finis, k-do Cuj Haj interrompis: "Tiam niaj ĉevalo-tirataj kulturiloj estos tirataj de traktoro. Kaj mi, la estro de la novkulturila grupeto fariĝos estro de traktor-grupo." Liaj vortoj eligis kontentan ridon el ĉiuj ĉeestantoj. Eĉ maljunuloj pleniĝas je tia fido kaj entuziasmo. Kaŭ Feng-ming, karesis al si la grizblankan hararon kaj diris kun rido: "Kvankam mi jam estas kvindek-kvar-jara, mi kuros al la socialismo kune kun vi junuloj!" Ankaŭ la dekkvin-jara knabino Niu Kuej-ĉen diris vortojn kun profunda signifo: "Mi devas bone lerni por fariĝi traktoristo."

En Paŭ-an-vilaĝo ni povas vidi la konturon kaj perspektivon de la nova kamparo. Ĝi firmaŝe iras sur la vojo de agrikultura kooperativo al novaj venkoj en la jaro 1952.

Trad. Censinio



# Giganta Ŝirmforstzono por Nordorienta Ĉinio

La grandega ŝirmforstzono planita de la Popola Registaro de Nordorienta Ĉinio estas io, kio neniam antaŭe okazis en la historio de nia lando kaj kio havas por la popolo grandegan gravecon.

Post liberigo, la laborentuziasmo de la kamparanoj estas multe plialtigita, kaj kampara ekonomio jam faris rapidan progreson. Sed troviĝas obstakloj sur la vojo al plua disvolviĝo de agrikultura produkto—obstakloj tiaj kiaj superakvoj, moviĝanta sablo kaj trosekeco.

Serioza ja estis la inundo de la rivero Liaŭ en 1951. En la okcidenta parto de Nordorienta Ĉinio kaj en la orienta parto de Interna Mongolio fruktodona grundo estas ŝanĝata en dezerton jaro post jaro. Ondo de sablo jam enterigis tutajn vilaĝojn en Fuju-gubernio, en la okcidenta parto de Nordorienta Ĉinio, englutante hejmojn, kovrante kampojn kaj devigante la loĝantojn translokiĝi antaŭ ilia senkompata antaŭeniĝo. Depost la freneza detruo de arbaroj fare de la japanaj kaj Kuomintangaj regintoj, blovas sabloventegoj kaj brilas la suno kun flava lumo preskaŭ tutjare.

Fuju, en Hejlungkiang-provinco, estas nur unu el la multaj gubernioj en tiu ĉi parto de la Nordoriento kiuj estas damaĝataj de moviĝanta sablo. La kamparanoj antaŭe batalis malsukcese kontraŭ la naturo. Ilia rikolto malgrandiĝis jaron post jaro sub la sablo-atako. Eĉ Ŝenjang (Mukden), la plej granda urbo en la Nordoriento, iutage estus enterigota sub la sablo se la drivado ne estus haltigota ĝustatempe.

## Katastrofoj Homfaritaj

Unu el la ĉefaj kaŭzoj de ĉi tiuj katastrofoj estas la senpripensa detruo de arbaro. Tio estas faktoro ne apartigebla de la krimoj de pasintaj reĝimoj. Preskaŭ sen escepto, ĉiuj reakciaj regintoj faligis arbarojn por ligno, aŭ por vendi por profito aŭ por konstrui al si majestajn palacojn kaj pompajn domegojn. Neniam pripenson ili havis pri konservado de arbaro. La nura "forstigado" kiun ili praktikis estis planti kelke da arboj ĉirkaŭ la palacoj kaj plezurgrundoj por plibonigi la "pejzaĝon". Ili neniam okupis sin je vera forstigo por elimini inundojn, trosekecon aŭ sabloventegojn por servi al industria kaj agrikultura bezonoj aŭ por moderigi la suferojn kaŭzitajn al la kamparanoj kaj laboristoj de tiuj ĉi katastrofoj.

Dum la militarista regado kaj jajana okupado de la Nordoriento, ne nur tre malmultaj estis plantitaj, sed la rabisteca arbarfaligo serioze difektis la lignorezervon.


Kiel Marks elmontris, antaŭ la alveno de socialisma socio, oni ĉiam detruas arbarojn, konservado kaj arboplantado estas nekonsiderindaj kompare kun la damaĝo kaŭzita de la detruado. La reakcia reganta klaso estas ne volonta forstigi, ĉar, laŭ Marks, forstigo bezonas tiel longajn periodojn por kapitalreinspezo, ke ĝi ne estas profitdona investo por la kapitalistoj.

Por defendi siajn mastrojn, la burĝaj sciencistoj ĉiam insistas ke la arbaroj venis antaŭ la homaro, kaj ke la homaro alportas dezertojn. Tio estas distordo de fakto; fakte estas la reakcia reganta klaso kiu faras dezertojn, kaŭzas inundojn kaj alportas malfeliĉojn al la homaro.

## Naturo Ŝanĝata

Sed nun la registaro de Ĉinio apartenas al la popolo mem. Sub la gvidado de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ Ze-tung, la Popola Registaro konsideras la interesojn, ne nur nuntempajn sed ankaŭ for-estontajn, de la popolo. Ni nepre devas ĉesigi la senpripensan faligon de arboj; kaj por la profito de la popolo, ni devas komenci grandskalan forstigan programon, por ke la kaŭzoj de estontaj katastrofoj estu eliminataj.

En la frua stadio de liberigo, kiam batalado kaj agrara reformo estis ankoraŭ en procedo, estis neeble por ni aranĝi tian projekton. Tamen en 1950, la Popola Registaro de Nordorienta Ĉinio, konsiderante la konstantan minacon de sabloventego, inundo kaj trosekeco en tiu regiono, decidis pri projekto de ŝirmforstzono en la okcidenta parto de Nordorienta Ĉinio.



La nuna ekspansiita projekto, senprecedenca en nia lando, planas forstzonon etendiĝantan suden de Kannan kaj Fuju en Hejlungkiang-provinco en la norda ekstremo de Nordorienta Ĉinio ĝis Liaŭtung-duoninsulo, en la suda ekstremo de Nordorienta Ĉinio kaj Ŝanhajkuan, la startpunkto de la Granda Muro, en Hopej-provinco. Ĝia longeco estas ĉirkaŭ 1,100 kilometroj, kaj ĉe la plej larĝa parto ĝi havas la larĝecon de pli ol 300 kilometroj. Ĝi ampleksas kvinonon de la teritorio de Nordorienta Ĉinio, etendiĝante en 60 gubernioj en la provincoj Hejlungkiang, Liaŭsi, Kirin, Liaŭtung kaj Jehol kaj en Interna Mongolio. Pli ol tri milionoj da hektaroj estos forstigitaj kiam la projekto kompletigos.

La nuna plano estas plivastigita kopio de iu frua projekto farita de la Popola Registaro de Nordorienta Ĉinio en julio, 1950. En la printempo 1951, jam komenciĝis forstigo malgrandskale. De tiam, 18 milionoj da arbidoj estas plantitaj en areo de pli ol 4,000 hektaroj.

Laŭplane, tiu ĉi gravega projekto plenumiĝos en 15 jaroj. Kiam la forstzono plenkreskos, la nun neuzeblaj 1,800,000 hektaroj da tero, kiu egalas al ĉirkaŭ triono de la kulturteroj en Anglio, fariĝos uzeblaj agroj. En alia areo de proksimume la sama grandeco kiel la supre dirita, agrikultura produkto estos plialtigita 30 procentojn. Kaj la forstzono produktos ĉiujare grandan kvanton da ligno valoranta 40 milionojn da tunoj da greno.

La socialisma Sovetunio estas la sola lando en la tuta mondo, kie tia titana projekto pri ŝirmzona forstigo, kia la nia, estas sukcese plenumita. Nenio simila estas ebla en ia ajn kapitalisma lando.

Kiel Prezidanto Maŭ diris:

“Ĉiuj faktoj pruvas, ke nia sistemo de popol-demokratia diktatoreco estas ege supera ol la politikaj sistemoj de la kapitalismaj landoj. Surbaze de ĉi tiu sistemo, nia popolo povas manifesti sian senfinan kaj neelĉerpeblan forton. Tia forto ne povas esti konkerita de iu ajn malamiko.”

Sub la gvidado de Prezidanto Maŭ, ni povas venki ne nur niajn malamikojn, sed ankaŭ naturajn katastrofojn.

La konstruo de tiu ĉi ŝirmforstzono estas granda batalo por transformi la naturon. Tio estas batalo por venki sabloventegon kaj elimini superakvegion, por eltordi pli da kulturebla tero el naturo, por pli grandaj rikoltoj, por pli sekura vivo kaj pli sanitaraj kondiĉoj por la kamparanoj. Tio estas ankaŭ batalo por pli multe da ligno kion ni poste bezonos en industrio, transportado kaj aliaj konstruaj laboroj.

### **Konservado kaj Plantado de Arbaroj Aliloke**

Krom la plano de ŝirma forstzono, atento estas donata al la konservado kaj plantado de arbaroj en la areo de Ĉangpaj-monto, kie la longdaŭra faligado fare de la malamikoj jam detruis grandan parton de la lignorezervo. Esploro kaj projekto estas farita ankaŭ por kreo de nova arbaro en la valo de la rivero Sungari, en Kirin-provinco, por sekurigi la valon kontraŭ minaco de inundoj.

Samtempe, en specifa areo ĉe la supraj branĉoj de la rivero Sungari terkulturo estas malpermesata. En aliaj arbar-areoj, kie iam estis faligado, oni flegas la

junajn arbojn kaj protektas la pli aĝajn. Komenciĝis programo ankaŭ por la forstigo ĉe la fontoj kaj laŭ la bordoj de la riveroj Liaŭ, Liu, Tajze, Hun, Nun, Moŭtan, Ŝiramuren, Kuntu kaj Jalu.

Grandaj nombroj da arboj estos plantitaj laŭlonge de aŭtovojoj kaj fervojoj, en urboj, urbetoj kaj vilaĝoj, ke post dudek jaroj ĉiuj niaj urboj kaj vilaĝoj estos verdaj kaj ĉiuj niaj ŝoseoj arbo-ombreataj. Tiam la klimato estos ŝanĝita, la pluvkvanto ĝustigita kaj la riĉaĵoj de nia lando pliigitaj.

Atento estas donata ankaŭ al arbaro-protektado kaj antaŭgardo de arbarfajro. La popolamasoj estas organizataj kiel kontraŭfajraj batalantoj, scio de fajro-antaŭgardo estas disvastigata kaj al la popolamasoj estas komprenigite ke protekti arbarojn signifas protekti la grandajn interesojn de la ŝtato kaj la popolo.

Forstigado ja estas longdaŭra tasko. Tiel longe kiel ekzistas la homaro, laboro de forstigado ne povas ĉesi. Tio servas ne nur por la nuntempaj interesoj de la popolo, sed ankaŭ por la interesoj de multaj generacioj venontaj.

Estas vere, ke nun la Nordoriento estas la ĉefa ligno-produktejo de nia lando. Tamen, se okazas nur arbofaligado sen plantado, ne nur katastrofoj estos alvenigataj, sed iun tagon tiu ĉi fonto de ligno necesa por konstruado nepre estos elĉerpita. Tial estas ege urĝa grandskala forstigado.

Ju Fukang

### **Kontraŭventa Forstzono por Orienta Ĉinio**

Giganta forstiga projekto protektos en la estonteco Orientan Ĉinion de ruinigo de ventegoj kaj marinundoj. En la pasinteco en norda Kiangsu triono de la plantaĵoj laŭlonge de la marbordo estis forbalaita ĉiujare de violentaj ventegoj alblovantaj de la Pacifiko. Marakvo ofte inundis la regionon kaj alkalizis la teron. Agrikultura produkto estis kripligita.

La projektita forstzono etendiĝos pli ol 500 kilometrojn. Ĝi komenciĝos ĉe la buŝo de la Janze-rivero proksime de Ŝanhajo kaj tra la buŝoj de sennombraj akvovojoj, inkluzive la Huaj- kaj Ji-riverojn. Ĝi iros ĉirkaŭ 500 kilometrojn norden laŭlonge de la mardigoj kaj fine kuniĝos kun la forsto sur la Juntaj-montaro. La nova forstzono kovros pli ol unu kaj duonan milionojn da hektaroj, ĉirkaŭ triono de la ebenaĵo de norda Kiangsu-provinco.

Preparoj por tiu ĉi projekto estis faritaj tuj post liberigo en 1949. Depost tiam grupoj da ekspertoj faris esplorojn pri la regiono. Arbidoj estas nun kreskigataj sur la ŝtataj farmoj kaj de kamparanoj en Orienta Ĉinio.

Post kiam la projekto estos komplete efektivigita en 1958 kaj la subjugado de la Huaj-rivero ankaŭ finita, la vizaĝo de tiu ĉi regiono tute ŝanĝiĝos. Riĉegaj rikoltoj estos certigitaj sur du milionoj da hektaroj da tero kaj produkto pliigos preskaŭ je duono.



**為建設新中國而奮勇前進**





La nove rekonstruita Laborista Klubo de Dajren-haveno.



Plialtaj salajroj faras laborist-akceptantojn la plej granda klientaro de tiu ĉi magazeno en Tienzin.

En hejmo por maljunaj laboristoj ĉe Fuŝun.





Gelaboristoj ĝuas senzorgan libertagon

## LA ĈINAJ LABORISTOJ KONSOLIDAS SĜANON, RIPOZON

"Tiu ĉi registaro plibonigos la materian kondiĉojn de la unua sesio de la Ĉina Popola Politika Konsultiva Komitato, kio estas scenoj el la feliĉa vivo ĝuata de

Ĉe la Junula Teknika Lernejo






Ĉi tie estas la bela Okcidenta Lago, Hangĉou.

## ŜTATOJ NUN RAJTAS KONKORDI KAJ AMUZIĜON.

"Kaj kulturajn vivon de la popolo," deklaris la Konsilia Konferenco. Jen estas kelkaj el la laboranta popolo de nova Ĉinio.

En la Dajrena Fervojo-fabriko.




Laborista Sanatorio de Ŝintun, Fu ŝun, Nord-orienta Ĉinio.

Laboristoj estas fervoraj vizitantoj al la Legoĉambro de Nova Kulturo en la Ŝtata Pekina Biblioteko.



En la sanatorio de la Sesa Ŝtata Koton-teksejo de Ŝanhajo.





Defendu Mondpacon! Laboristoj de la mondo, unuiĝu kaj batalu por longdaŭra paco kaj popola demokratio! Kontraŭbatalu la instigantojn de nova milito!

*Plakato de Su Kuo-ĉin*

# Disvolvo kaj Plifortigo de Kulturaj Rilatoj inter Popoloj

En rememorigo de Hugo, Gogol, Leonardo da Vinci kaj Avicenna.

Maŭ Tun

Vicprezidanto de Tutĉinia Federacio de Literaturista kaj Artista Rondo.

La dua kunsido de la Monda Pac-Konsilo kunveninta en Vienna, je la 1-7a de novembro, 1951, adoptis gravan rezolucion pri kulturaj rilatoj inter la popoloj. Konforme al tiu ĉi rezolucio la Monda Pac-Konsilo alvokis ĉiujn popolojn de la mondo memor-festi ĉi-jare kvar grandajn kontribuojn al la kultura heredaĵo de la mondo: la 150a datreveno de naskigo de la franca verkisto Viktoro Hugo; la centjara datreveno de morto de la rusa verkisto Nikolao Gogol; la 500a datreveno de naskiĝo de Leonardo da Vinci, la itala pentristo, skulptisto kaj sciencisto; kaj la 1,000a datreveno de Avicenna (Ibn Sina), la araba kuracisto, astronomo kaj matematikisto.

La ĉina popolo komprenas la gravan signifon de tiu ĉi rezolucio de la Monda Pac-Konsilo. La brilaj atingoj de tiu ĉi kvar grandaj homoj en la kampoj de scienco, literaturo kaj arto aldonis multe al la bonstato de homaro kaj donis grandan antaŭen-puŝon al plibonigoj en la viv-maniero de la popolo. Same kiel ni honoris aliajn grandajn homojn de mond-kulturo al kiuj la homaro ŝuldas, ni donas honoron kaj nian profundan admiron al Viktoro Hugo, Gogol, Leonardo da Vinci kaj Avicenna, kies kontribuon al la homaro ni konsideras kiel trezoron komunan al la popoloj de la mondo. Ni ankaŭ komprenas ke rememorigo de tiuj ĉi eminentuloj estas grava ne nur por kulturaj rilatoj sed estas rimedo plifortigi reciproke komprenon inter la popoloj kaj antaŭenigi la aferon de ilia lukto kontraŭ agresiva milito kaj en defendo de mondopaco. Respondante al la alvoko de la Monda Pac-konsilo, la Ĉina Pac-komitato petis naci-ŝkalajn popolajn organizojn okazigi unuigitajn grandskalajn memor-festojn en majo.

La unua ĉina traduko de la ĉefverko "La Mizeruloj" de Viktoro Hugo aperis en tiu ĉi lando tiel frue kiel antaŭ kvindek jaroj. Antaŭ la eksplodo de la Kontraŭjapana Milito en la jaro 1937, granda parto de la literaturaj verkoj de la granda franca verkisto estis tradukitaj en la ĉinan lingvon, kelke el ili eĉ tradukitaj dufoje.

Lu Sin, la granda iniciatinto de la moderna ĉina literaturo, la unua enkondukis en tiun ĉi landon Gogol antaŭ ĉirkaŭ 40 jaroj. Dum la lastaj jaroj de sia vivo, Lu Sin mem entreprenis la tradukon de "Mortintaj Animoj", kiu de tiam influas Ĉinion multe. Simila intereso ankaŭ montriĝis pri la verko "La Revizoro" de Gogol. Antaŭ la Kontraŭ-japana Milito, tiu ĉi fame konata komedio estis ludita en multaj lokoj de tuta Ĉinio. Eĉ dum la milito, ĝi ne estis malofte prezentata ambaŭ en la liberigitaj regionoj kaj en tiuj sub Kuomintang-regado. Nun, preskaŭ ĉiuj verkoj de Gogol estas tradukitaj en la ĉinan lingvon.

Depost la enkonduko de la arto de Eŭropa Renesanco, la verkoj de Leonardo da Vinci gajnis la admiron de

ĉina popolo. Liaj verkoj ludis gravan rolon en la disvolvo de realismo en la moderna arto de tiu ĉi lando.

Ankaŭ Avicenna, la Araba sciencisto antaŭ 1,000 jaroj estas alte estimata de ĉinaj sciencistoj kaj kuracistoj, kiuj estas konsciaj pri lia valora servo al la homaro.

Ĉinio Interesiĝas en la Monda Kulturo

La ĉina popolo ĉiam ricevas la verkojn de eminentaj kreintoj de monda kulturo kun la plejaj fervoro kaj intereso. Kial ni sentas ĉi tian varman admiron? Ĉar, ni la ĉina popolo estis de longe sub la regado kaj la kruela ekspluato de imperiismo, feŭdaj bienposedantoj, burokrataj kapitalistoj kaj kompradoroj, ni forte sentas ke ni ne luktas sole. En la idealoj al kiuj tiuj ĉi kvar kulturaj figuroj dediĉis siajn vivojn—ilia malamo por la mallumaj tagoj, ilia kontraŭstaro al agresiva milito, iliaj penadoj pro la progreso de la homaro kaj konfido en la popola potenco—unuverte, ilia granda sindediĉo al literaturo, arto kaj scienco, kiujn ili turnis en armilojn servantajn la popolon anstataŭ la regantaj kaj ekspluatantaj klasojn, ni ĉi tie sur la Azia kontinento vidas precize reflektitaj niajn proprajn amojn kaj malamojn kaj la idealojn por kiujn efektiviĝi ni longe luktis.

La ĉina popolo fine atingis sian liberigon kaj establis sian propran potencon sub la gvidado de la Ĉina Komunista Partio. Nun ili estas luktantaj por defendi mondpacon kaj konstrui novan Ĉinion. La liberigita ĉina popolo tiel urĝe postulas kulturon ke en la periodo de nur du jaroj, centoj da milionoj da laboristoj kaj kamparanoj de urboj kaj vilaĝoj, en minejoj kaj fabrikoj, aliĝis al aktiveco en diversaj kulturaj kampoj en spirito de arda konkuro. La popolo donas plenan liberon al siaj iniciatemaj kaj kreantaj povoj; ili jam "stariĝis" kulture.

Kiel nia granda gvidanto Maŭ Ze-tung instruas nin, ni ne nur devas plialtigi la gloran kulturan heredaĵon de nia lando por disvolvi novan nacian kulturon de la ĉina popolo tiel ke ĝi ankaŭ kontribuos al progreso de la homaro, sed ni ankaŭ devas alporti al la ĉina popolo ekzemplojn de progressa monda kulturo el eksterlando. Efektivigante la instruon de Prezidanto Maŭ, ni ĉiam prezentas al la ĉina popolo elektaĵojn el diversaj naciaj kulturoj de la mondo. Ni trezorigas kaj respektas la atingojn de ia ajn nacia kulturo, kiuj estas sanaj, progressaj kaj utilaj al homaro, dum ni kontraŭstaras kontraŭ tiuj, kiuj estas abomenindaj kaj kadukaj. Estas precize ĉar ni trezorigas la kulturajn kontribuojn de Hugo, Gogol, da Vinci kaj Avicenna tiom kiom la popoloj de Francio, Sovetunio, Italio kaj Arabio trezorigas ilin kaj rigardas ilin kiel modelojn por niaj penadoj, ke ni estas rememorigantaj tiujn ĉi kvar eminentulojn kun tiel granda amo kaj respekto. Ankaŭ pro tio ni varme bonvenigas la ideon de disvolvo de kulturaj

rilatoj, per kiuj ĉiuj popoloj reciproke helpas kaj ni promesas doni niajn plej bonajn penadojn al tiu ĉi laboro.

Sed la imperiismaj landoj precipe Usono, ne volas kuraĝigi demokratajn kulturajn rilatojn inter la popoloj de la mondo. Rifuzante doni vizojn, ili malhelpas sciencistojn, literaturajn kaj kulturajn laborulojn kaj asociojn de diversaj landoj viziti unu la alian. Ili malpermesas cirkuladon de libroj kaj tagjurnaloj. Ili ofte kalumnias la kulturojn de aliaj landoj, por dissemi suspekton kaj malamon inter ili. Tipa ekzemplo estas Usona imperiisma kalumnio kaj distordo rilate al la kultura vivo de Ĉinio, Sovetunio kaj la popolaj demokratioj.

La Usonaj imperiistoj estas malamikaj al kulturo; ili piedpremas valorajn kulturojn de aliaj nacioj; ili konsideras la tiel nomatajn "Usonan viv-manieron" de filmoj, malkarajn romanojn, komikajn, priskribantajn mortigon, rabadon, gentan antaŭjuĝon, adoradon de dolaro, k.t.p. pli interesaj ol la atingajoj de homoj kiel Hugo, Gogol, da Vinci kaj Avicenna; kaj pli valoraj ol ilia propra popola kultura heredaĵo, kiu troviĝas en la verkoj de Walt Whitman kaj Mark Twain. En Usono oni estas en danĝero ne nur esti denunciita kiel "ruĝuloj", perdi siajn laborojn kaj esti malliberigitaj pro legaĵo eldonitaj en Sovetunio. Ili estas en danĝero esti nigralistita pro lego de progresaj verkoj de aliaj landoj, aŭ eĉ de usonanoj, kiuj advokatas justecon kaj pacon, kaj denuncas perforton.

Antaŭ nelonge kiam la Kuomintangaj banditoj estis ankoraŭ regantaj la ĉefteron de Ĉinio, tiu ĉi venena,

agresa imperiista "kulturo" de Usono importiĝis per Usonaj militŝipoj kaj reakciaj misiistoj. Tia "kulturo" certe ne estas bonvena kaj la ĉina popolo ne toleras, ke ĝi donu sian venenan influon ĉi tie, ĉar nun ili jam fariĝas mastroj de sia propra lando.

Tio estas kion la Usona imperiismo vere intencas per siaj kalumnioj ke la nova Ĉinio elpelas okcidentan kulturon. La nova Ĉinio elpelas nur tion, kio estas agresa, venena kaj korupta. Sed ni bonvenigas kaj trezorigas ĉiujn sanajn, progresajn kaj klerajn kulturajn atingajojn ne konsiderante iliajn originojn. Fremduloj, vizitantaj Ĉinion, nur vizitu niajn bibliotekojn kaj librovendejojn, kaj rigardu la katalogojn de eldonaĵoj, kaj ili tuj komprenas ke la kalumnioj de la Usonaj imperiistoj pri "elpelo de okcidenta kulturo" ne indas eĉ ridon.

La pacamantaj popoloj de la mondo estas nun serioze minacataj per la furiozaj milit-preparoj de Usonaj imperiistoj. Por inciti milit-histerion, paralizante la konscion de la popolo, premsufoki la justan postulon por paco, Usonaj imperiistoj kaj iliaj kunuloj estas intensigantaj penso-kontrolon kaj limigantaj liberecon de parolado en sia propra lando, kaj samtempe ili estas penantaj malhelpi kulturajn rilatojn inter aliaj nacioj. Ni firme postulas ke kulturaj rilatoj inter popoloj de diversaj landoj estu disvolvigitaj kaj plifortigitaj, por certigi pacan kunlaboron kaj interkompreniĝon. Ni ĉina popolo deziras frate unuiĝi kun popoloj de ĉiuj aliaj landoj por anstataŭi la imperiistan blokadon kaj kulturen agreson per intimaj kulturaj rilatoj.

Tradukis: W. S. H.

## ĈINAJ LABORISTOJ MARSĜAS ANTAŬEN

(daŭrigo de P. 86)

viroj" kaj ke "la specialaj interesoj de laboristinoj devas esti protektataj." La principo de egala pago por egala laboro jam establiĝis kaj efektiviĝis. Gravedaj laboristinoj ricevas 56tagan salajratan infannaskan forpermeson. Fabrikoj dungantaj virinojn devas havi tagajn infanejojn por iliaj infanoj. Okdek procentoj de ĉiuj laboristinoj en Ĉinio jam organiziĝis en sindikatoj kaj neniu profesio estas fermita al ili.

### Progresoj en Laborista Kulturo

Ne nur la socia kaj materia pozicio de ĉinaj laboristoj plene ŝanĝiĝis, sed ili povas nun satigisian malsaton por kultura, scienca kaj pli alta teknika scio, antaŭe monopoligita de membroj de la reganta klaso. Sub la regado de la reakciuloj, granda proporcio de la laboristoj estis tenata en analfabeteco. Kiel diferencaj estas la kondiĉoj nun oni povas vidi el la fakto, ke 2,020,000 laboristoj en fabrikoj kaj minoj studas kulturajn aŭ teknikajn subjektojn en sia libertempo. Pli ol 20 mallongperiodaj mezlernejoj en la tuta lando ebligas por la laboristoj kompletigi, en relative mallonga tempo, la regulan edukon kiu estis rabita for de ili sub la malnovaj kondiĉoj. Progresaj kaj modelaj laboristoj estas sendataj, en sufiĉe granda nombro, al la Ĉina Popola Universitato, kie ili pagas nenion por instruo aŭ dormejo kaj daŭre ricevas 60 ĝis 75 procentojn de sia lasta salajro en industrio. Laboristaj lernejoj de diversaj gradoj nun enkorpiĝis en la regulan edukon sistemon de Ĉinio. Iliaj diplomitoj ĝuas ĉiujn rajtojn kaj ŝancojn de tiuj kiuj lernas en aliaj lernejoj kaj kolegioj.

Krom ĉi tiuj oportunoj, la ĉinaj sindikatoj establis 66 kulturajn palacojn, 8,720 klubojn, 5,119 bibliotekojn, 1,157 moveblajn bibliotekojn, 3,272 ĥorojn, 8,438 atletajn teamojn, 600 disaŭdigajn staciojn kaj 400 moviĝantajn filmprojekciajn grupojn.

### Ĉinaj Laboristoj kaj Paco

Dum la du kaj duona jaroj post la liberiĝo, ĉinaj laboristoj jam gustumis la fruktojn de la revolucia venko kaj suriris la vojaron al senlima prospero kaj progreso. Ili defendos per siaj vivoj kontraŭ iu ajn atenco invadi ilian patrion kaj prirabi ilin je ĉi tiuj gajnoj kaj perspektivoj. Ili ankaŭ scias ke paco en Azio kaj la tuta mondo estas urĝe bezonata por rapide konstrui pli bonan vivon. Tial la ĉinaj laboristoj donas tian fortan subtenon al la Ĉinaj Popolaj Voluntuloj kiuj, kun la la Korea Popola Armeo, tiel brave repelas la provon de la imperiistoj por denove firmteni la Azian ĉefteron. Tial ili iris mem al Koreio kiel transportistoj kaj donacis tian grandan sumon por armiloj por repeli agreson. Tial ili tiel entuziasme partoprenis en la subskribokampanjoj por la Stokholma Alvoko kaj la Kvinpotenca Pacpakto kaj kontraŭ la rearmigo de Japanio.

En la Monda Federacio de Sindikatoj, reprezentantoj de la Tutĉinia Federacio de Laboristoj entuziasme subtenis la rezolucion subteni la decidojn de la Monda Packonsilo pri la paca solvo de la Koreia konflikto kaj la gardo de internacia paco. Ĉi tiu ago de la ĉina laborista klaso por paco ne estas papera gesto. Ĉiu venko kiun ĝi gajnis en la revolucio, ĉiu progreso kiun ĝi faris en produkto, estas frapego donita al la militinstigantoj kaj ega plifortigo al la laborista klaso kaj la pacaj fortoj de la tuta mondo.



# LA PEJHAJ-PARKO

Lin Huej-in


Tio ja estas ekster via supozo kaj vin mirigas, ke povas troviĝi pitoreska pejzaĝo kiel la Pejhaj-Parko (Pejhaj signifas "Nordmaro"—la trad.) kun vasta etendaĵo de akvo sub la libera ĉielo en la koro de tia urbo kiel Pekino kun pli ol 2,000,000 loĝantoj, konstruita laŭ strikta plano kun stratoj rektaj kaj konstruaĵaro simetria. Precipe kiam vi unufoje transpasas la poŝton Ortestudego kaj Jadĉielarko inter Pejhaj-o kaj Ĉunghaj-o (Ĉunghaj signifas "mezmaro"—la trad.) la pitoreska pejzaĝo ekvidate trans la akvo certe profunde vin impresas. Plej belaj la Ĉjunghua-Insulo (Ĉjunghua signifas "jado bela" aŭ "belego"—la trad.) elstaranta centre de la akvo, la Blanka

Turo sur la montsupro kaj la pitoreskaj domoj kaj belvederoj en la arbaro baniĝantaj en la brilo de la suno mateniĝa aŭ la subiranta. La promenantoj sur ŝtonpontoj kaj la belaj boatoj naĝantaj sur la akvo, ĉio kaj ĉie estas kvazaŭ en bildo. Lagetoj, ĝardenoj kaj arbaroj estas la pulmo de urbo moderna, per kiuj oni malkompas la veteron, belas la ĉirkaŭaĵon kaj refreŝigas la spiriton; la funkcio de Pejhaj-a pejzaĝa distrikto, kiu servas al sano de la tuta loĝantaro en Pe-

okino, estas ne taksebla. La arta kaj historia valoro de Pejhaj-o ja estas alto, sed despli valora estas tio, ke ĝi revenis en la manojn de la popolo, kaj fariĝis parko de la popolo.

Ni alte taksas la historion de Pejhaj-o, ĉar ĝi estas grava parto de la historio de Pekino. Ĝi estas la origino de la nuna Pekino. Antaŭ longe, dum la Liaŭ-dinastio (en la dekunua jarcento), laŭdire tiu ĉi loko de Ĉjunghua-Insulo estis la fame konata teraso de la "Reĝa Patrino Siaŭ". Dum la Kin-dinastio (en la dekdua jarcento), la regintoj lukse konstruis por si ĉi tie ekskursan palacon eksterurban, fosis lagon, transformis la terason en insulon, transportis famajn ŝtonojn de malproksime por konstrui monton, kaj

konstruis belan palacon sur la montsupro. Kiam li faligis Ĉungtu-on (tiel nomiĝis Pekino dum la Kin-dinastio—la trad.), ĉi tie loĝis Kublaj Ĥan, imperiestro de la Juan-dinastio. Kiam li fondis sian ĉefurbon, Kublaj Ĥan forĵetis la malnovan urbon Ĉungtu-o, kaj elektis la bazon de la ekskursita palaco kiel la centron de siaj palacoj en Tatuoj (tiel nomiĝis Pekino dum la Juan-dinastio—la trad.) kaj nomis Pejhaj-on kaj Ĉunghaj-on Tajje-lageto. La tri palacoj de la Juan-dinastio staris aparte sur ambaŭ bordoj de la lago, kaj inter la akvo sude estis la Fe-landa Ronda Palaco, kiu estas nun nomita la Ronda Kastelo, norde de la Ronda kastelo estas ponto



Fronta vidaĵo de Pejhaj-Parko

kondukanta al la "longviv-monto", t.e. la nuntempa Ĉjunghua-insulo. La insulo majeste staris en la Tajje-lageto, la Luna Palaco estas sur la montsupro, de kie oni povas de malproksime rigardi la Okcidentan Monton, kaj malsupren rigardi la tutan urbon. La Luna Palaco estis la ĉefa el la palacoj de Kublaj Ĥan, kaj ankaŭ estis la plej eminenta punkto de la urbo. Sed post kiam la tri palacoj de la Juan-dinastio estis forĵetitaj kaj la nunaj Malnovaj Palacoj estis konstruitaj en la Ming-dinastio, la pozicioj de Pejhaj-o kaj Ĉunghaj-o estis aliĝantaj kaj ne plu tiel gravaj. La regintoj rekonstruis por si ambaŭ Pejhaj-on kaj Ĉunghaj-on en ludejon kaj festenejon, kaj ilin alinomis "Interna Parko". La Luna

Palaco estis forlasita, kaj disfalis en la Vanli-jaroj (1573-1620—la trad.) de Ming-dinastio. En la fruaj jaroj de la Cing-dinastio, la regintoj fosis la Nanhaj-on (Nanhaj signifas "Sudmaro"—la trad.), kaj plimulte konstruis kortojn kaj ĝardenojn, kaj ĉe la bordoj norda kaj orienta de Pejhaj-o troviĝis kvietaj lokoj aparte. La trajto de Pejhaj-o ege ŝanĝiĝis en 1651. En la loko de la antaŭa Luna Palaco konstruiĝis la Blanka Turo en Tibeta-stilo, kiun ni nun vidas. La palaco, kiu sin trovis duonmonte sur la suda flanko de la insulo, estis rekonstruita en Budaan templon, kontraŭ la Ronda Kastelo malproksime trans la akvo, kun ŝtonŝtuparo rekte kondukanta de malsupre. Tiu ĉi pejzaĝo jam konserviĝis tricent jarojn ĝis nun.

La arta strukturo de Pejhaj-o heredis la palacĝardenan tradicion krei fantazian fe-landon, tial, ĝi konstruiĝis ĉefe laŭ imago de belvederoj kaj konstruaĵoj fe-landaj: montsupre estas la altanoj, palacoj, laŭboj kaj salonoj, meze estas la kavernoj, kaj norde ĉirkaŭstaras la koridoro longa 300 metrojn, ekster kiu estas balustrado el blanka ŝtono; meze de la koridoro troviĝas la Belonda Salonego super kiu estas la belvedero Juanfan Loŭ (t.e. "Malproksimvelo-Belvedero"—la trad.). Ĉi tiu grupo de konstruaĵoj kaj la Kvindrakaj Laŭboj trans la akvo mal-

proksime rigardas unu al la alia. Ĉe la norda bordo de Pejhaj-o, krom la Buda templo ankaŭ troviĝas la Malgranda Okcidenta Ĉielo, konstruita en influo de la budaisma pentraĵo. La aliaj, kiel la pontoj, laŭboj kaj bordoj, certagrade imitis pejzaĝ-pentraĵon. La konstrua plano de Pejhaj-Parko estas riĉa je arta tradicio. Ĝiaj zigzagaj, intersaj kaj variemaj pejzaĝoj estas faktoro kial la vizitantoj tiel ĝin ŝatas. Kaj samtempe pro siaj vastaetendiĝo de akvo, bordoj kun arbaroj, granda skalo kaj spirito majesta ĝi estas plej taŭga loko por la junuloj modernaj en libera tempo remi, skii, surgrimpi montsupron kaj rigardi malproksimen.

Trad. Kiugi

# Rakonto Pri Mulo

Liu Ji-seng

En la unua tagdeko de novembro, 1950, mi iris en Hoŭvang-Vilaĝo, Ningzin-Gubernio, Ŝantung-Provinco. Tiam la superuloj donis al mi taskon aĉeti mulojn kaj ĉevalojn en difinita tempo por subteni la fronton. Mi konsideris ke la tasko estas tre malfacila, kaj por ĝin sukcese plenumi, estas necese fari delikatan kaj profundan mobilizan laboron. Vespere, mi aranĝis kunvenon de vilaĝaj kadroj, informiĝis pri la nombro de muloj kaj ĉevaloj en la vilaĝo, kaj projektis kiel ekkomenci la laboron.

Laŭ sciigo, en la tuta vilaĝo estis nur unu mulo, kiu konformiĝis al la kriterio. Ĝi apartenis al Vang Fu-ĵung. Kiam mi demandis, ĉu la mastro de la mulo estas progresema kaj facile mobilizebla, la vilaĝaj kadroj diris ridante: "En nia vilaĝo, se nur vi klarigu la kialon, la popolo tuj prenas sur sin la taskon, precipe kiam ĝi estas por subteni la fronton. Se vi nur mencias, ke estas por kontraŭbatali Usonajn diablojn, la popolamasoj des pli volonte plenumas la taskon sen hezito."

La duan tagon, apenaŭ tagiĝis, kiam mi aŭdis ke iu vokas ekster la pordo. Mi rapide vestiĝis kaj malfermis la pordon. Estis maljunulo kun blanka hararo — probable pli ol 60-jara, tamen kun vigla spirito. Li diris eksidinte: "Mi aŭdis ke la superuloj volas aĉeti ĉevalojn kaj mulojn por milito, mi ne scias ĉu la mulo, kiun mi bredas, konformiĝas al la kriterio aŭ ne. Kamarado, bonvolu iri kaj ĝin vidi. Se ĝi kvalifikiĝas, mi volas ĝin vendi al nia patrio. Tute ne gravas, je kia prezo ĝi vendiĝos."

Li diris unuspire, ne lasante min unu vorton intermeti. El la interparolo mi sciis ke li estas Vang Fu-ĵung. Post momento, li aldonis: "En la aferoj por subteni la fronton kaj batali kontraŭ Usonaj diabloj,

mi certe agas en la unua linio, kaj neniam postrestos."

Mi estis profunde kortuŝata de lia arda patriotismo. Kaj antaŭ ol mi povis ion diri por kuragi ĝi tiun maljunan patrioton, li min tiris al sia hejmo por vidi la mulon.

Jen lia hejmo — nova domo kun kotmuroj kaj korto pure balaita. Meze en la salono pendis portreto de Prezidanto Maŭ. Kaj en la grenujoj greno amasiĝis kun alta pinto. Rigardante al la portreto de Prezidanto Maŭ, kaj montrante la domon kaj grenon, li diris: "Se ne venus Prezidanto Maŭ, ĉu mi povus vivi



kiel hodiaŭ? Se ne bataladus la volontuloj ekster la landlimo kontraŭ la Usonaj lupoj, kian danĝeron ili farus al ni! Estas pli grave ol ĉio alia sendi mian mulon por subteni la fronton!" Poste, li kondukis min al stalo. Estas ja bonega mulo, kun hararo pupura tutkorpe, ne havanta eĉ unu haron alikoloran. Ĝi estas grasa kaj forta, kvazaŭ preter la hararo fluus oleo. Ĝi ofte tretis kaj batis la teron, montrante sian forteton. Ĝian kapon karesante, la maljunulo al mi diris: "Ĝi havas ankoraŭ nur kvar dentojn. Kiam mi ĝin aĉetis, ĝi estis mulido. Kiel knabo, ĝi povis nur manĝi, kaj estis kapabla por nenio. Dum kelkaj jaroj, mi ĝin edukis, kaj nun ĝi

plugas, ĉaron tiras kaj muelilon turnas, ĉion ĝi bone faras." Sin turninte al ĝiaj grandaj okuloj la maljunulo daŭrigis: "Nun vi iros batali kontraŭ Usonaj diabloj, ha, kia feliĉo! Kiam vi estos en armeo, bone lernu kaj bone laboru!" La maljunulo sin apogis ame al la mulo tiel firme, ke ĝi eksaltis, kaj la maljunulo frapetinte ĝin per manplato, diris ridante: "Jen, kiel vi petolas! Se mi estus ankoraŭ juna, mi irus al Koreio antaŭ longe, kaj certe farus pli bonan servon!" Tion dirante, li ekridis, kaj ankaŭ ridigis min. Li al mi sinturnis: "Kamarado, kiam vi ĝin forsendos?" Mi respondis: "Postmorgaŭ. Li kapjesis: "Tio estas bona!"

En la sekvanta tago, Vang Fu-ĵung iris al foiro kun sia mulo. Oni pensis ke li volas vendi la mulon ne al la registaro, sed al privata persono. Tion mi ne kredis, ĉar mi profunde komprenis la ardan patriotismon de la maljunulo.

Kaj efektive, la maljunulo revenis kun la mulo posttagmeze. Sed la mulo ŝangiĝis en aspekto: la brido estis nun nova, kolhararo kaj vosthararo estis bone netigitaj, kaj al ĝi estis najlitaj novaj hufoferoj. Kiam mi demandis lin pri la kialo, li respondis: "Ĝi iros por batali kontraŭ Usonaj diabloj, kial mi ne bone ĝin adiaŭas?"

Kaj krome se mi ne ŝanĝus por ĝi novajn bridon kaj hufoferojn nun, por tio estus pagonta la ŝtata kaso!" Mi ne povis plu subpremi mian emociion, kaj diris: "Onklo, se ĉiuj tiel amas sian patrion kiel vi, la Usonaj diabloj estos certe frakasitaj!" Li respondis: "Ĉiuj aliaj estas pli patriotismaj ol mi. Tio kion mi faris ja estas nenio!"

La sekvintan tagon, mi kaj la maljunulo kaj kelkaj vilaĝaj kadroj kune sendis la mulon. La maljunulo surmetis al ĝi grandan ruĝan paperfloron, kiu des pli eminentigis la mulon. Sur voje, la maljunulo ofte ridis rigardante la mulon, kaj ni ankaŭ ridis.

Elĉinigi Ly Moje

## La Dua Stadio de la Subjugado de la Huaj-rivero

La dua stadio de la akvokonserva projekto de la Huaj-rivero nun bone progresas kun pli ol miliono da kamparano-laborantoj sur la konstruejoj laŭlonge de la tuta etendiĝo de pli ol 1,000 kilometroj.

La Huaj-rivero trafluas Honan-, Anhuej- kaj Kiangsu-provincojn. La unua stadio de la projekto komencita en novembro, 1950 kaj finita en julio, 1951, ĉefe celis malebligi inundon. La tuta river-sistemo estis ĝustigita kaj akvokonservejoj estis konstruitaj en la supraj branĉoj de la rivero. La dua stadio komencita en lasta novembro emfazas la meton de firma fundamento por akvo-utiligado en irigacio, navigacio kaj akvopovo.

La nuna laboro estas multe pli grandskala ol tiu de la unua stadio. La kvanto de terlaboraĵo estos duobligita t.e. 400 milion kubmetroj, duoble kiom oni movis en la konstruo de la Panama-kanalo. La tasko en tiu ĉi stadio estas kompletigi la konstruadon de la digoj de la du akvokonservejoj ĉe Pajŝa kaj Panĉiaŭ en Honan-provinco kaj la grandan rezervejon ĉe Fuzeling en norda Anhuej. Krome, multaj lagoj kaj grandaj kaj malgrandaj branĉoj de la Huaj-rivero estos dragitaj, kaj multaj malgrandaj digoj, kaj kanaloj estos konstruitaj.

En norda Kiangsu-provinco, 800,000 kamparanoj jam laboris dum la pasinta monato sur la nova 170-kilomentrojn longa ĉefkanalo irigacia, kiu portos sufiĉe da akvo por irigacii unu kaj duonan milionojn da hektaroj.

### Nova Digo Okcidente de Nankino

Kvinmil laboristoj estas nun konstruantaj 70-metrojn altan digon trans la Pi-riveron, branĉfluo de la Huaj-rivero, 170 aer-mejlojn okcidente de Nankino. Kun la kompleto de la digo en la somero de 1953, formiĝos 23-kvadrat-kilometra akvokonservejo kapabla konservi 470,000,000 kubmetrojn da akvo kaj funkciigi hidroelektrejon liverantan 1,000-2,000 kilovatojn ĉiujare.

La nova digo finos la inundojn laŭlonge de la Pi-rivero kaj faros ĝin navigebla por transporti teon, lignon kaj bambuon produktitajn en la regiono de Tapie-montaro. Fabrikoj de ligno kaj papero estos konstruitaj proksime de la digo kaj estos funkciigataj per la elektro de la hidroelektrejo.

## Agrikulturaj Celoj por 1952

Agrikulturaj planoj pretigitaj de administrataj regionoj por la kuranta jaro montras ke la tutlanda produkt-plano de 1952 por pliigi 8% en grenproduktado kaj 20% en kotonproduktado estos realigitaj kaj eble superitaj.

**Nordorienta Ĉinio** antaŭkalkulas, ke ĝi produktos 20 milionojn da tunoj da greno ĉijare. Tiu ĉi cifero superas tiun de 1949 je preskaŭ 7 milion tunoj.

**Norda Ĉinio** celas pliigi sian grenproduktadon je 3,900,000 tunoj, kiuj faros la rikolton rekordrompa. La kotonproduktado pliigis je 86,000 tunoj.

**Orienta Ĉinio** planas pliigi la grenproduktadon je 10%. Tio superos



la plej altan antaŭmilitan produkt-nivelon je 5.6%. Kaj pliigos ankaŭ la koton-produktado kaj aliaj industriaj plantaĵoj.

**Centra-suda Ĉinio**, kie agrara reformo ankoraŭ ne kompletigis, espereble ege pliigos la agrikulturan produktadon ĉijare. Ekzemple, Kuangtung-provinco celas pliigi la ĉijaran rizproduktadon je 750,000 tunoj super tiu de 1951.

Ĉi tiuj pliproduktoj estos atingitaj per sciencaj metodoj de kulturado, pohektara pliprodukto, vasta irigacio kaj pligrandskala uzo de plibonaj semoj kaj sterko.

### Ŝtataj Magazenoj Malaltigis Prezojn

Rezulte de la landskala movado kontraŭ korupta alproriga, malŝparo kaj burokratismo la prezoj de miloj da artikloj en ŝtataj magazenoj tra tuta Ĉinio estas reduktitaj meznombro je 8%.

**Pekino:** Prezmaltigo de pli ol 3,300 artikloj estas anoncita de la Pekina filio de la ŝtata Ĉina Magazeno. Tiu ĉi estas la dua fojo de prezmalaltigo en du semajnoj. La unufoja prezmalaltigo inkluzivis 560 artiklojn. Ĉifoje la prezoj estas reduktitaj

meznombro je 7.5% kaj en kelkaj kazoj eĉ je 34.95%.

**Ŝanhajo:** La prezoj de pli ol 10,000 artikloj estas reduktitaj meznombro je 11%. Ĉar Ŝanhajo estas urbo, kie pli ol 80% de ĉinaj porkonsumaj produktaĵoj estas produktataj, la tiea prezredukto certe alportos bonon ankaŭ al la loĝantoj en malproksimaj regionoj kiel Tibeto kaj Sinkiang.

**Nankino:** Meznombra prezredukto de 10% estas farita al pli ol 1,500 artikloj. (Kelkaj prezoj malaltigis eĉ je 36.5%.)

**Hangĉou:** La prezoj de pli ol 1,420 artikloj malaltigis je 2-42%.

**Cingtaŭ:** Meznombra prezredukto de 10% estas farita al pli ol 620 artikloj. Kelkaj artikloj malkariĝis eĉ je 44%.

**Ŝenjang (Mukden):** Pli ol 600 artikloj malkariĝis meznombro je 9.8%.

En Nordokcidenta Ĉinio la prezoj de 900 artikloj malaltigis; en Nordorienta Ĉinio, 600 artikloj; en Centrasuda Ĉinio, 3,000 artikloj.

La komercaĵoj en la ŝtataj magazenoj estas plejparte aĉetitaj el privataj fabrikoj. La ŝtataj magazenoj ordinare provizas nefinitajn produktaĵojn aŭ krudajn materialojn al la privataj fabrikoj, kiuj liveras al ili finfaritajn fabrikaĵojn laŭkontrakte. Elimino de korupto kaj malmodera profitĉaso ebligis la nunan prezredukton. En la estonteco, antaŭ ol fari kontrakton kun privataj fabrikoj la laboristoj en la privataj fabrikoj estos konsultataj por ebligi precizan takson de la produktokosto kaj fiksi raciajn prezojn, kaj elpensi novajn rimedojn por plibonigi la kvaliton de la produktaĵoj.

### Edukado de Infanoj

En Ĉinio sin trovis pli ol 440,000 elementaj lernejoj kun pli ol 37 milionoj da lernantoj je la fino de lasta jaro. Tamen, tio ne inkluzivas la grandegan nombron da geknaboj lernantaj en leg-lernaj kursoj. La nombro de infanoj en kindergartenoj estas preskaŭ duoblo de tiu dum la Kuomintanga regado. Nun jam estas pli ol miliono da instruistoj.

En multaj partoj de la ĉina kamparo, kie agrara reformo jam plenumiĝis, la nombro de lernantoj duobligis, triobligis aŭ, en iuj regionoj, sepoble plimultiĝis.

Laŭ planoj de la registaro, en kvin jaroj 80% de la ĉinaj lernejaĝaj infanoj vizitos plentempajn lernejojn, kaj en 10 jaroj, universala deviga edukado realiĝos.

# Komuna Volo de l' Homa Rond'

Vortoj de Ĉaŭ Se  
Muziko de Ĉju Ŝi-sien  
Elĉinigis Laŭlum

*Ĝo!e kaj entuziasme*

Jen, ven- kaj fla- goj plaŭdas en la front', De mil-mi-loj ton- dras

ĉi- e vi-vu- ond'! *f* Maŭ Ze- tung. Sta- lin.

Maŭ Ze- tung. Sta- lin, Vi gvi- da por

ni lum- font'. *p* Kun ru-ğa flag' en front'. Al sa- ma

ce- lo tu-ta l' mond'. Por demokra- ti- o, Por longdaūra pa- co! -

Ko-mu-na vo- lo de l' ho-ma rond'! *mp* Kun ru-ğa flag' en front'.

Al sa- ma ce- lo tu-ta l' mond'. Por demokra- ti- o, Por longdaūra

pa- co! - *ff* Ko-mu-na vo- lo de l' ho -ma rond'!

# La Maljuna Ŝipestro

Kau Juan

## I

Mi iris kun la ŝipoj al fiŝĉasa ekskurso sur la maro. Tio estis la unua marvojaĝo dum mia vivo.

Mi enŝipiĝis ĉe la vesperiĝo. La maristaro okupis sin je enŝipigo de glacio, petrolo kaj je ordigo de diversaj aĵoj... Ĉangĉjo, kiu akompanis min al la ŝipo, estis konata kiel hastemulo. Li kondukis min en la kajuton kaj tuj foriris haste al la ŝipo n-ro 10 antaŭ ol li konatigis min al la aliaj. Mi ekmemoris, ke en tiu ĉi ŝiparo, kiel mi iam aŭdis, troviĝas bonega maljuna ŝipestro, sed mi ne sciis ĉu li estas en la sama ŝipo kie mi estas. La ŝipistoj estis okupataj, cetere mi ankoraŭ ne konatigis kun ili, tial ne konvenis informiĝi.

Sensala akvo estis enŝipigita kaj ankro—levita. Kun pulsado de la motoro, la du ŝipoj forlasis la havenon unu post alia en la sunrebrilo.

La maro fariĝis ĉiam pli vasta kaj mia entuziasmo pli alta. Ŝajnigante kuragecon, mi pasis tien ĉi tien sur la ferdeko por iom rigardi. La kunuloj ĉiuj dormis, ĉar ili intencis ellitiĝi frue morgaŭ por subakvigi la reton, escepte de iu, kiu troviĝis en la direktilejo supre. Sed tiu estis grava loko kaj ne decidis por fremda persono iri tien.

Tiu, kiu marvojaĝas unuafoje, marmalsaniĝas senescepte. Ne povante min retenigi plu, mi grimpis sur la ferdekon kaj ekvomis.

“Ĉu estas Kaŭĉjo? Vi efektive manĝigas la markatojn!” Iu vokis min el la direktilejo. La larĝa kaj laŭta voĉo sonis kiel malnova amiko.

Baldaŭ tiu alvenis kun io en la mano. Lian vizaĝon mi ne vidis klare en la nokto.

“Kuracilo mankas en la ŝipo, nu, gargaru vian buŝon per akvo, manĝu ion da peklita rafano kaj la marmalsano baldaŭ pasos.” Dirinte li frapetis mian ŝultron kaj aldonis konsole: “Vometi ne gravas.” Li lasis al mi la aĵon kaj foriris. Iu penso fulmis tra mia kapo: Eble li estas la maljuna ŝipestro? Sed mi tuj neis; neeble, ĉu li ankoraŭ restas ĉe la direktilo en profunda nokto?

Mi faris laŭ lia konsilo kaj baldaŭ resaniĝis. Tiu en la direktilejo ankoraŭ zorgis pri mi, dirante: “Iru dormi, la nokta aero estas tro malvarma.”

Kiam mi dormis ankoraŭ tre dolĉe, enverŝiĝis tra la kajuta enirejo la voĉo de alvoko al matenmanĝo. Mi eligis mian kapon de sub la kovrilo kaj aŭdis tiun demandi ridante:

“Kiel vi fartis lastnokte post la vomado?”

Mi konstatis per la voĉo, ke li estas ĝuste la hieraŭa persono. Nun mi vidis lin klare. La vizaĝo estis plena de profundaj sulkoj. La buŝo kunpremiĝis pro la defalo de tro multe da dentoj. La haroj griziĝis. Laŭaspekte li ŝajnis jam tre maljuna, sed liaj spirito kaj voĉo montriĝis, ke li estas pli forta ol ni junuloj.

“Laŭ la kutimo de la fiŝkaptistoj oni manĝas je la tagiĝo. Aligiĝinte al ni, vi devas akomodi vin al la nova situacio.”

Estis vere tre frue. La suno ĵus elŝovis duone sian rondan, ruĝan vizaĝon el la oriento sur la maro kaj dancis antaŭen sur la ondaro laŭmezure de la irado de la ŝipo. Tie ankaŭ la ŝipo n-ro 10 jam ĵetis la reton en la maron. Paralele kaj unu for de la alia, la du ŝipoj moviĝis malrapide laŭ la fluo sur la matena marsupraĵo trenante post si la reton.

Mia stomako malplenis pro la hieraŭa elvomado. Mi multe manĝis. Mi precipe ŝatis manĝi malmolajn kaj longe maĉeblajn manĝaĵojn. Bonŝance la maljunulo ne havis dentojn. Li lasis al mi la tutan kruston, kiun li derompis de la maiza kuko. Apud Juĉjo, la parolema grandulo, ekkriis:

“Malgranda Jang, nun finiĝis via negoco! Rigardu, jen la maljuna ŝipestro komencis kukan kooperadon kun la kamarado.”

Malgranda Jang estis metilernanto en la motorejo, junulo kun vizaĝo olemakulita.

Mi surpriziĝis: li ja estis la ‘maljuna ŝipestro’! Ne estis mirinde, ke li tiel zorgis pri mi. Mi spertis neesprimeblan ĝojon.

“Ŝipestro,” mi ankoraŭ ne kutimis aldoni la epiteton ‘maljuna’. “Ŝipestro, kiomjara vi estas?”

“Mi? Jam kvindek jarojn mi havas!” li diris kun ekbrilo en la okuloj kaj retenis sin de rido.

Mi ĵetis esploran rigardon al la aliaj. Ĉiu kaŝis sian buŝon post la manĝpelvo, kvazaŭ ili atendus ridindaĵon antaŭviditan. Jes, certe kaŝis sian veran aĝon de mi. Kvindek? For de la vero ĝi estis laŭ la sulkoplena vizaĝo, griza hararo kaj sendenta buŝo.

“Ne! Mi povas vidi, ke vi havas pli ol kvindek jarojn, verŝajne, sesdek...” mi diris kun firmeco por montri mian juĝkapablon, sed ridego eksplodis ĉirkaŭ mi antaŭ ol mi povis fini mian parolon.

“Ĉifoje li divenis trafe,” iu konfirmis, sed en lia voĉo vibris neniom da sincereco.

“Kvankam li ŝajnas tiel maljuna, fakte li ankoraŭ ne atingas sian kvindekan jaron! Nur kvardek kvin.” Malgranda Jang tuj eldiris la veron, ĉar li estis finfine la plej juna.

“Se iu demandis pri mia aĝo, mi ĉiam respondis ‘kvindek,’ la maljuna ŝipestro parolis ridante per sia laŭta voĉo. “Se mi dirus la veron, neniu kredus. Mi ne atendis, ke eĉ tio malefikas hodiaŭ. Kaŭĉjo ankoraŭ pensas, ke mi malpliigis mian aĝon. Profitante la sperton, mi diros la sekvontan fojon: sesdek.”

Ĉiuj ridis. Mi ne atendis, ke li estas tiel sprita.

Kinĉjo, la ĉef-maristo klarigis al mi:

“Vi estas enlandano, kamarado Kaŭ. La enlandanoj ne tiel rapide maljuniĝas kiel ni surmaraj homoj...”

La maljuna ŝipestro intermetis:

“Krome, mi estas oceanano, kiu maljuniĝas ankoraŭ pli rapide ol la surmaraj homoj! Tiel Kaŭĉjo maltrafis ankoraŭ pli fore en la diveno.”

La aŭskultantoj ridis refoje, kvazaŭ ĉiu lia parolo estus nepre sekvata de ridsono.

Mi sentis, ke Kinĉjo diris la veron: enlandanoj maljuniĝas pli malrapide. Mi memoras, ke mia patro, kiu penlaboris dum sia tuta vivo, aspektis nur tiel maljuna en sia sesdeka jaro kiel la ŝipestro nun estas. Mi pensis tamen: sed kial oni nomas lin maljuna ŝipestro, se li estas ne maljuna? Ĉu li servis jam multajn jarojn kiel ŝipestro kaj oni tiel lin nomas pro lia veteranece? Sed kiam mi informiĝis, mi eksciis, ke li fariĝis ŝipestro nur en la dua jaro post la liberigo, antaŭ tri jaroj. Dum mia meditado la maljuna ŝipestro jam finmanĝis, viŝis sian buŝon per la mano kaj ĝemspiris. La mallarĝigitaj ridantaj okuloj ekmalfermiĝis kaj li rakontis pezakore kun sia rememoro:

“Kaŭĉjo, mi estis loĝanto de Kuanglu-insulo, infano de malriĉulo. Mi havis nek peceton da tero nek boaton. Ekde mia dek-dua jaro, mi helplaboris sur jonko. En dudeka mi komencis labori en tiu ĉi vaporŝipo por fiŝkaptado kiel retisto. Mi faris plej multe da laboro sed ricevis malplej multe da mono kaj havis grandan familion por vivteni. Mi estis plena de peno kaj zorgo, kiel povus mi ne rapide maljuniĝi? Kalkulu ja kiom da jaroj mi pasigis sur la maro! Ĉiu jaro havas 360 tagojn, escepte unu-du monatojn en meza somero, oni devis pasigi 300 tagojn surmare sen lavado...”

“Antaŭe, se vi ne estis fidindulo de la kompanio aŭ ne favorigis al si la superulojn, ne revu pri la ŝipestreco malgraŭ via eminenta kapablo: vi laboros la tutan vivon kiel simpla maristo kaj fine restos al vi nur la skeleto kovrita de haŭto kiam vi fariĝos maljuna. Antaŭ la liberigo, ĉiuj iam estris nian ŝipon, estis senescepte parencoj de la ‘sinjorino’ en la kompanio kaj scipovis nenion! Ili simple dormis tuj post la enŝipiĝo kaj lasis ĉion al la ĉef-maristo. Sed la ŝipestro ricevis ĉiam la ŝipestran salajron je la monatfino. Ankaŭ iuj konsilis al mi: ‘Ĉian lertecon vi akiris, do klopodu favorigi al vi la superulojn por ricevi promocion.’ Mi estis tia obstinulo, mi neniam povas vostosvingi kiel hundaĉoj al la fiuloj, eĉ se vi detranĉus mian kapon.” Li parolis grincante per la dentoj kaj levante sian pugnon kun venĝemo. Li leviĝis post momento kaj frapis sian sidvanganon kvazaŭ li volus defrapi la pezan rememoron. Jen li denove mallarĝigis siajn okulojn:

“Se la liberigo kaj la komunista partio ne venus tiel rapide, mi jam mortus antaŭ longe. Nun estas feliĉe por vi junuloj! Vi vivas senzorge. Vi havas laboron, lernadon, amuzojn kaj sekurecon (la laborasekuron), kaj ĉiu havas vastan perspektivon antaŭ si. Kiuj vivas sub la flegado de Prezidanto Maŭ, estos ĉiam junaj kaj belaj dum la tuta vivo kaj ne similos al mi, kiu jam perdis siajn dentojn havante nur pli ol kvardek jarojn...”

“Hahaha!” Ĉiuj ridegis kaj reregis la antaŭa gaja atmosfero, kiu rememorigis al ni, ke ni estas liberigitaj nun. Jes, estu gajaj, ne lasu la pasintan doloron pezi sur nia koro. Neniu povos forrabi al ni la feliĉon. Tion ĉiu ŝipano komprenis pli bone ol mi, precipe la maljuna ŝipestro.

Post la mango, Juĉjo portis al mi paron da gantoj, kiuj estis ankoraŭ novaj.

“La maljuna ŝipestro ordonis, ke mi ankaŭ donu al vi paron por tiri la reton kaj elekti fiŝojn.” Li aldonis min rigardante: “Mi demandis: ‘Ĉu asigni laboron ankaŭ al li?’ Sed li diris: ‘Kiel vi scias, ke li ne volas labori? Ne rigardu lin kiel fremdulon.’”

Aŭdante tion mi ĝojis per la tuta koro, ĉar la maljuna ŝipestro jam traktis min kiel membron de la ŝipo.

## II

Ĉiu el la ŝipanoj estis gaja kaj parolema. Dum mi lernis labori, mi fariĝis familiara kun la maristoj. Ni ŝercis kaj rakontis kune kiel malnovaj amikoj, kiuj jam kunvivis dum pluraj jaroj. El ilia buŝo mi lernis kial ili donis la epiteton “maljuna” al la ŝipestro. Unue la maljuna ŝipestro estis vera veterano sur la maro. Per siaj okuloj, li povis scii precize la veterŝanĝojn, la vojlinion de fiŝaro, neniam okazis al li akcidento dum la marvojaĝoj, li ĵetis la reton al la ĝusta loko kaj kaptis grandan kvanton da fiŝoj. Due, kiel Juĉjo diris:

“La maljuna ŝipestro! Li estas kvazaŭ la maljuna patro en nia ŝipo. Lia zorgemo ne preterlasas eĉ tre bagatelan aferon de iu ajn. Oni ne komprenas, de kie venis al li tia neelĉerpebla energio. Ordinare li nur babilas kaj ridas kaj neniam prenas sur sin la aspekton de ĉefulo. Sed kiam vi faras eraron, precipe kiam vi malŝparas ion ajn, tio kolerigas lin pli forte ol se vi rompus lian prapatran tombon. Li riproĉas tute sencere monie. Tamen, kiam vi konfesas vian eraron kaj ne ripetas, li tuj forgesas sian koleron kiel patro, kiu multe zorgas pri la progreso de sia filo.”

Dum du tagoj, mi jam eltrovis el la ĉiutagaĵoj, ke plena vero estas ilia aserto.

Estis jam frua somero. Laŭ la diro de la fiŝkaptistoj, en tiu sezono la fiŝoj demetas sian frajon kaj disiĝas, kiam ili vidas, ke la fiŝetoj elkoviĝis kaj kreskas. Se la ŝipestro estus sensperta, li ĵetus la reton al malĝustan lokon kaj eltirus ĝin malplena. Kinĉjo diris al mi, ke lastfoje du ŝipoj restis sur la maro pli ol dek tagojn kaj kaptis nur ĉirkaŭ ducent kestojn da fiŝoj, kiun kvanton oni ricevus per unu aŭ du retĵetoj dum abunda fiŝsezono. Ĉi-foje ni iris ankoraŭ pli malfrue, sed ni neniam levis malplenan reton. La kvanto de ĉiu reto atingis ĉirkaŭ tridek kestojn. Dum du ŝipoj tiris la reton alterne, nia ŝipo ĉiam ricevis pli multe da fiŝoj ol nia kunul-ŝipo n-ro 10. Ekzistas kutimo en fiŝkaptado sur la maro: kiam unu ŝipo levas la reton por elpreni la fiŝojn, ĝia kunulo (la alia ŝipo) nepre alproksimiĝas por rigardi. Ĉiufoje nia ŝipo turnis sin kaj direktiĝis al la ŝipo n-ro 10. Tiam mi rigardis atente kaj enmemorigis kiom da kuleregoj oni ĉerpis el la reto kaj komparis kun nia ŝipo. Tre mirinde! Ĉiufoje ili ricevis unu aŭ du kuleregojn malpli ol nia. Ne malestimu la malgrandan diferencon! Ĉiu kulerego entenis kvin aŭ ses kestojn da fiŝoj—tio egalas al du-tri-cent ĝinoj. Se tia stato de afero daŭrus, la diferenco estus tre granda. En tia

tempo la maljuna ŝipestro en la direktilejo kriis per sia laŭta voĉo. Li klarigis, ke ili ne laboras en ĝusta maniero kaj kiel ili devas labori. Li kriis kiel eble laŭ siaj gorĝo kaj forto, sed ankaŭ laŭ sia saĝeco. De lia maltrankvila, serioza kaj ekscitita mieno oni povis klare vidi, ke li deziregus, ke la kunul-ŝipo tuj ricevu tiom da fiŝoj kiom lia. Kiam la homoj en la alia ŝipo ne bone aŭdis, li volus transsalti al ĝi por montri al ili propramane kiel oni devas manovri. Li estis tiel sincera, sed lerteco ne estas akirebla en unu tago, kion li ankaŭ sciis, eĉ pli bone ol aliaj.

Mi ankaŭ vidis la manifeston de lia patreca koro. La kruro de Malgranda Jang estis frapvundita de fiŝkesto dum kalabaso-grapladoj. Pridemandante, kiu ĵetis keston tiel neatente, li jam trovis tolpeceton kaj bone bandaĝis la vundon propramane. Poste oni ofte aŭdis, ke li demandas lin: "Ĉu pliboniĝas? Zorgu ke malpuraĵo ne eniru la vundon." Aŭ: "Ne neglektu la vundon pro via juneco. Tro malfruus, se ĝi pusos." Dum la lastaj fojoj, ŝajnis al mi, Malgranda Jang mem jam tute forgesis la vundon, sed li ĉiam memoris ĝin.

La posttagmezon de tiu tago, la vento plifortiĝis kaj la ŝipo dancis supren kaj malsupren kiel balancilo. Mi refoje sentis kapturigojn. La aero estis malfreŝa en la kajuto kaj resti sur la ferdeko ĝenus la laboradon, dume mi timis la venton sur la pruo. Fine mi trovis plej oportunan ripozejon sur la kuirejo ĉe la poŭpo. Tie mi kuŝis kaj babilis kun la kuiristo. La tutan posttagmezon mi ne moviĝis unu paŝon. Ĉe la vesperiĝo, kiam oni levis la reton, mi ekaŭdis, ke la laŭta voĉo de la maljuna ŝipestro demandas maltrankvile en la fronto:

"Kie estas Kaŭĉjo? Mi tre longe ne vidis lin!"

"Li dormas," iu respondis.

Li ankoraŭ pli multe maltrankviliĝis kaj diris preskaŭ kverele:

"Kiu diras, ke li estas dormanta? Mi ĵus vizitis la kajuton kaj trovis neniun tie. Vi estas tiel malatentaj..."

"Mi estas ĉi tie, maljuna ŝipestro!" mi tuj respondis laŭte.

Mi jam kutimis nomi lin "maljuna ŝipestro". Mi sentis ial, ke multo mankas se mi nomus lin simple ŝipestro.

La nuba vetero finiĝis, La surmara sereno estis speciale agrabla. Vento kvietiĝis kaj ondoj trankviliĝis. Ĉirkaŭe ĉie estis blublua marakvo. La suno verŝis sian lumon sur la akvon en ora rebrilo.

En hela vetero, la pruo fariĝis la plej bona loko, pura kaj malvarmeta. Marakvo preterglitadis sub la ŝipsubaĵo, eligante mallaŭtan orelplaĉan brueton kvazaŭ frustrante al iu interesan kaj neniam finrakonteblan belan fabelon.

Estis la plej komforta kaj facila momento kiam la reton estis malsupren ĵetita. La fiŝoj estis enholdigitaj. La reto kaj kablo estis faligitaj en la maro. Ĉiuj restis senokupaj kaj kolektiĝis sur la pruo, ĝuante la sunan varmon duonnude kaj babilante ĉion ajn, pli gaje ol en vespera festo. Tiuokaze, la maljuna ŝipestro estis plej vigla. Li ŝajnis granda knabo kaj ofte rakontis ion el la ĉiutagaĵoj vive kaj multkolora. Lia larĝa kaj laŭta voĉo sonoris tra la maro.

Kelkfoje la maljuna ŝipestro inventis ankaŭ amuzojn novajn. Li igis nin ĵeti la fiŝetojn, kiuj estis ne enkestigindaj, al la mevoj. La mevoj allogitaj venis ĉiam pli multe kvazaŭ iu disvastigus la novaĵon. Baldaŭ centoj da ili kolektiĝis! Ili flugis supren kaj malsupren ĉirkaŭ la ŝipo, kaj pafiĝis malalten por kapti la fiŝojn, kiuj estis multoble pli grandaj ol iliaj kapoj, kaj englutis ilin en tuteco. Jen la maljuna ŝipestro reelpensis ion pli gajigan. Li diris: "Prenu fadenon kaj ligu fiŝon al ĉiu ekstremo. Vi vidus du mevojn ilin englutintajn flugi kunligite. Tio estos tre amuza." Iu efektive tiel aranĝis. Jen du avidaj mevoj estis kunligitaj kaj flugis intertenante kun peno. Tio nin ridigis tiel ke larmo elfluis. Jen li kriis subite kvazaŭ rememorante pri io: "Nu, instru al ni kantadon, Kaŭĉjo!" Ĉiuj aplaŭdis kaj kriegis ĥore. Kvankam mi mallertis en kantado, precipe antaŭ amaso, sed aŭdinte lian ĵusan parolon kaj vidante la estantan cirkonstancon, mi tute forĵetis la intencon rifuzi, tuj laŭtigis mian raŭkan voĉon kaj kantis.

La nokto sur la maro estis vere bela. Oni ĵetis ankron kaj la motoro ĉesis funkcii. Oni ne povis percepti eĉ brueton malgraŭ aŭdostreĉo. Sennombre da steloj brilis sur la ĉielo. Estiĝis brizeto, sed ĝi ne povis eĉ movi la dormantan marakvon. Mi rampis el mia kajuto kaj staris ĉe la masto. La maljuna ŝipestro alpaŝis baldaŭ.

"Vi ĝuas la noktan pejzaĝon?"

"Jes, mi vivas unuafoje sur la maro kaj volas ĉion satrigardi."

"Ĉu iu restas ankoraŭ en la kajuto?"

"Ne." Mi miris kial li demandis pri tio.

"Do estingu la lampon!" Tion dirinte li jam malsupreniris por ĝin estingi.

Mi trovis lin iom stranga. Kial li ekstraktis min tiel senceremonie kaj atentis pri tia bagatelo?

La sekvintan tagon mi unuafoje vidis, ke li ekkoleras.

La dua retĵeto de nia ŝipo liveris pli ol dek kule-regojn da fiŝoj, kiuj plenigis pli ol sesdek kestojn. Estis la unua retĵeto, kiu liveris tiom multe dum tiu ĉi ekskurso. Bezoniĝis multe da glacio kiam la fiŝkesto estis portataj en la holdon. Malgranda Jang ŝercis kun Juĉjo kiam li ŝovelis glacieron. Ili ridis kaj faris multe da bruo, dume la glacio estis disĵetita sur la tuta planko. Vidante tion la maljuna ŝipestro diris kun severa mieno, kvankam lia voĉo ne estis pli laŭta ol ordinare, sed la impresio estis tute alia kaj entenis en si multe da koleremo.

"Kiom vi povas perlabori ĉiutage? Ĉu vi povas perlabori tiom da glacio por la ŝtato? Ĝi devenis de la sango kaj ŝvito de ni laboristoj kaj estas peko tiel ĝin malŝpari!"

Li ne plu daŭrigis, sed de la tremado de liaj lipoj oni povis vidi kun kiom da peno li retenis sin de plua parolo. Oni ne kredus, ke li antaŭ nelonge traktis Malgrandan Jang tiel varme.

Kvieto regis denove sur la ŝipo kaj aŭdebla estis la bruo de la motoro. Mi forte hontis rememorante la okazintaĵon de la hieraŭra nokto pri la elektra lampo. Li ja ne estis stranga, li estis simple bona homo, kiu ne toleras la malŝparon pri la ŝtata posedaĵo.

Eĉ plej signifiĝanta bagatelaĵo li ne permesis malŝpari. Se kelkaj fiŝoj elglitis dum la levado de la



reto, li nepre relevis ilin. Kiam iu uzis sensalan akvon, li ĉiam admonis:

“Surmare la sensala akvo estas same multe valora kiel la gasoleno, ne malŝparu!”

Jen flosilo sur la reto difektiĝis. Iu forĵetis ĝin, sed li tuj relevis ĝin kaj frotis atente.

“Kiel! Vi jam forĵetis ĝin? Ĝi estas ankoraŭ uzebla. Cetero ĝi ne okupas multe da spaco, sinjoro!”

Kiam malfeliĉe okazis ia akcidento, li klopodis eviti damaĝon per tutaj siaj forto kaj saĝo. Foje nia reto kroĉiĝis sur rifo. La ŝipo iris, iris kaj ekhaltis. La vizaĝo de la maljuna ŝipestro paliĝis. Li tuj signalis al la ŝipo n-ro 10, ke ĝi tuj haltu. Li ordonis serioze, ke la anoj de la tuta ŝipo ne konfuziĝu kaj obeu lian direktadon. Ĉiuj agis streĉe kaj aplombe laŭ lia ordono kvazaŭ sur batakkampo. Fine venkis la maljuna ŝipestro. Oni elsavis la kablonojn kaj la reton nur kun kelke da truoj. Ĝi estis baldaŭ riparita. La tuta ŝipanaro estis kovrita de malvarma ŝvito. Juĉjo kaj Kinĉjo flustris al mi:

“Ja estas li. Ĉe alia homo la reto kune kun la kablo estus perdita. Kiom granda estus la perdo!”

Depost tiu okazo mi ne nur trovis lin afablega, kiam mi vidis lin, sed havis ankaŭ elkoran respekton al li. Lia zorgemo pri la ŝtata posedaĵo multe kortuŝis min.

Vesperige de tiu tago, la glata marsupraĵo ruĝiĝis persikflore sub la prilumado de la sunrebrilo. Rigandate okcidenten de sur la ŝipo ĝi ne plu estis blua, sed ruĝa maro. Nuberoj ŝvebis sur la ĉielo, sed ankaŭ ruĝe tinkturitaj.

Sur la pruo ni laciĝis de kantado kaj denove komencis babiladi. Laŭkutime ni aŭskultis la laŭtan voĉon de la maljuna ŝipestro. Oni ne scias kiel li ektuŝis la temon pri lia promocio al ŝipestro. Li rakontis kun mangestoj:

“Ili ĉiuj diris, ke mi taŭgas. Jes, mi estas taŭga. Antaŭe la estraĉo de nia ŝipo komprenis nenion kaj mi aranĝis ĉion por li. Verdire, kiu ne volus labori pli multe por la ŝtato en la nova epoko? Sed, kiam oni efektive elektis min ŝipestro, mi ekhezitis kaj sentis batojn ĉe la koro. Mi memoras, ke mi tiam esprimis modeste: ‘Sed mi ne estas kompetenta!’” Li imitis la tiaman embarasan tonon kaj ridigis ĉiujn. “Tamen en mia koro mi pensis: ĉu mi sonĝas? Mi ankoraŭ ne povis kredi, ĉu senhavulaĉo kaj obstinulaĉo kia mi efektive povas esti nomita ‘la estro de la tuta ŝipo’? Hejmen reveninte mi ripetis kion mi aŭdis al mia edzino. Ŝi ankaŭ ne kredis kaj insistis, ke mi freneziĝis. Ŝi iris speciale pro tio al la oficejo por informiĝi. Kiam ŝi revenis ricevinte konfirman respondon, ŝi tiel ĝojiĝis ke eĉ ŝiaj nazo kaj okuloj ridetis. Tiun tagmezon ŝi aĉetis kvaron-ĝinon da alkoholaĵo kaj preparis speciale por mi du almanĝaĵojn. Fine mi ja estis ŝipestro!”

La aŭskultantoj malfermegis sian buŝon, kvankam ne eksplodis je ridego, sed la rida mieno daŭris longe.

“Kamarado Kaŭ, multe da bonoj ni ricevis de la liberigo. Prenu min kiel ekzemplon. Mi mem estas ŝipestro kaj la ‘amatino’ de la ŝipestro—t. e. mia edzino, eniris la fiŝretan fabrikon antaŭ nelonge. Ŝia laborpago estis pli ol sufiĉa por ŝin vivteni. Eĉ la sortodiristo ne antaŭvidis, ke ŝi iam fariĝos ‘maljuna belulino’, nun ŝi ankaŭ portas ledŝuojn kaj iras fiere sur la strato dum manifestacia paradado. Plej neforgeseble estas, ke tiaj

homoj kiaj ni nun ankaŭ loĝas en bona domo. Ĉiufoje, kiam mi eniras mian hejmon mi ekmemoras, ke iu donas al ni tiom multe da bonoj kaj kiel mi devas labori por tion meriti. Krome, la popola registaro ĉiutage cerbumas por plialtigi nian vivnivelon!”

Tuj sekve li rakontis al ni historion pri domaĝo farita al publika posedaĵo.

Malgranda Jang estis tia homo, kia ne povas kaŝi sian penson:

“Ne ĉiam teksu absurdan fabelon al ni: Ĉu malŝpari iom da glacio estas jam tia grava afero?”

La maljuna ŝipestro ekgruntis kaj la rideto tuj malaperis de lia vizaĝo. Estas vere, ke li tuj transformiĝis en alian homon, kiam ajn okazis al li tiaj aferoj.

“Min aŭskultinte, vi tuj trovos la aferon grava. La kompanio ne disponas sufiĉe da glacio, kaj tiom da ŝipoj atendas en la haveno. Ankaŭ nia ŝipo atendis kelkajn tagojn ĉifoje, ĉu ne? Ĝi estas tiel malfacile akirebla, cetero en varma vetero ĝi fandiĝas pli rapide kaj estas pli grandakvante uzata. Se vi malŝparus, la fiŝoj odoraĉus sen glacio, ĉu tio ne estus perdo? Nun la fiŝoj malabundas, kaj eble kostos al ni pli ol dek tagojn por plenigi la holdon. Se ni malŝparus, kion ni faru kiam la glacio finiĝos dum la holdo estos ankoraŭ ne plena? Ĉu la du ŝipoj daŭrigu la fiŝĉasadon? Kompreneble tio estos neebla sen glacio. Se ili reveturu ne plenaj, la rikolto eĉ ne valoros tiom, kiom la gasoleno foruzita.”

Li paŭzis momenton. Malgranda Jang, ŝajne, volis ion diri, sed la maljuna ŝipestro rekomencis antaŭ ol li povis paroli: “Vi diros certe: ‘ne estas mia afero, ĉu ĝi sufiĉos aŭ ne, mi ja ricevos fiksitajn salajron, ne pli ne malpli.’ Jes, vi pensas tre bone. Sed vi ne konsideras, se ĉiuj en la kompanio pensus kiel vi, ĝi jam bankrotus antaŭ longe, do kie vi laboru?”

Malgranda Jang denove volis malfermi sian buŝon, sed li interrompis lin refoje: “Ne eldiru, mi travidas vian intiman penson, vi pensas, friponeto: ‘La kompanio apartenas al la ŝtato, ĝi rekrutigos sian kapitalon el iu alia loko, eĉ se ĝi malprofitos, kaj ĝi bankrotos neniam.’ Kiel senhonta vi estas tiel pensante! Nin vivteni per la helpo de aliaj fabrikoj? Se la laboristoj en aliaj fabrikoj ankaŭ tiel pensus kiel vi, sentaŭgulo, esperante nin ĉerpi monon el akvo per fiŝĉasado por ilin vivteni, do ambaŭ vi esperas unu de la alia: granda mallaboremulo dependas de la malgranda, fine ĉiu el ili kuŝos mortanta. Tiam ĉiuj fabrikoj fermiĝos kaj vi ankaŭ ne povos vivi mallaboreme. Tiam estus kiel en la jaro ‘46, ke ni kuros tien ĉi tien sur la strato por forvendi la persikojn aŭ ŝtrumpojn zumante kiel la mangoĉasaj muŝoj... Ĉu vi ne memoras la guston?”

Malgranda Jang ne plu provis paroli. Li tute konvinkiĝis, laŭaspekte, en la korfundo kaj grumblis kvazaŭ rafano estus en lia buŝo.

“Via maljunula cerbo estas vere viglepenza, via penso iras tiel malproksimen. Kion mi ankoraŭ povas paroli, jen vi ĉion eldiris!” Li stariĝis kaj kriis petoleme: “Raporton al la ŝipestro, mi faris eraron sed ne ripetos ĝin plu!”

La maljuna ŝipestro ne povis deteni sin de rido. Li estis tia homo, kies kolero tuj forvaporigis kiam la alia konfesis sian eraron. Li mallarĝigis siajn okulojn kaj diris palpante sian glate razitan kapon:

"Tiel mi estas: kvazaŭ ekzistus en mia menso iu ĉeno, laŭ kiu mia penso iras ĉiam plu seninterrompe. Tial mi povas preterlasi neniun bagatelon. Se mi vidas, ke iu lumigas la lampon eĉ momenton sen bezono, mi ne povas trankviliĝi antaŭ ol mi donas al li admonon."

Juĉjo kriis sinforgese, verŝajne, li ion ekkomprenis:

"Jen mi komprenas. Estas ne mirinde, ke mi ne povis multe pliboniĝi, ĉar mi malofte pensis—mi faris kiel oni ordonis. Mi ne deziris demandi, eĉ kiam mi ne bone komprenis. Nun mi devas multe pensi kaj bone labori kiel nia maljuna ŝipestro."

La maljuna ŝipestro ridis tiel ĝoje, ke li apenau povis fermi sian buŝon, kaj diris kapjese:

"Je la komenco ĉiam multe pensu, poste vi jam kutimiĝos. Ion ajn vidante vi ne povos deteni vin de pensado kaj prizorgado, alie vi ne povos trankviliĝi kvazaŭ vi farus grandan kulpon."

"Efektive tio estas kutimo. Antaŭe, kiam ni laboris sub la reakciuloj, ni pensis antaŭ ĉio: kiel ajn ni pene laboras, ni ricevos nenian profiton. Do ni sabotis, rompis la ilojn. Poste tio fariĝis kutimo. Ni iĝis malviglaj en la laboro. Publikajn posedaĵojn ni forĵetis senatente. Kiu pene laboris estis rigardata kiel misfaranto. La malnova kutimo ankoraŭ restis tuj post la liberigo. Nun ni devas forskui la malnovan kutimon kaj formi novan."

Juĉjo estis ĝojega, kaj lia mieno montris, ke li nun vere komprenis.

Ankaŭ mi parolis ion kun pasio. Tialkaze oni havas la devon ilin helpi per klarigoj, sed mi ĉiam sentis kiel senfortaj estas miaj paroloj kompare al tiuj de la maljuna ŝipestro, kvankam mi argumentis pli klare.

Tiuvespere ni ĉiuj babilis kontente kaj sentis nin entuziasmaj kaj malpezaj kvazaŭ forĵetus de sur la ŝultroj longe portitan ŝarĝon. Kiam ni kantis antaŭ enlitiĝo, ankaŭ niaj voĉoj estis plenaj de feliĉo.

### III

Tuta semajno jam pasis sur la maro. La tutan semajnon mi ne vidis la teron, sed mi neniel sopiris je la hejmo. Simple la homoj en la ŝipo jam sufiĉis min altiri.

Proksimiĝis la fino de la fiŝcasa ekskurso. Eĉ la kestoj, kiuj kuŝis sur la tegmento de la kuirejo malantaŭe, estis malsupren prenitaj por enteni la fiŝojn. Tio montris, ke la ŝipo baldaŭ hejmen veturos. La sensala akvo komencis gusti malbone kaj estis tre malagrabla trinki. Ĉjuĉjo rampis sur la akvokoston kaj prenis nekuiritan brasikon kaj ekmordis, dume li turnis sian kapon al mi kaj diris kun senlima ĝojo:

"Morgaŭ vespere ni hejmen veturos."

Post tagmezo oni levis la duan reton. Se la rezultato de tiu retĵeto estus kontentiga, nia tasko preskaŭ plenumiĝos post aliaj du retĵetoj—unu vespere kaj alia je la venonta mateno.

El tiu reto ni ricevis naŭ kuleregojn da fiŝoj, kiuj amasiĝis ĉirkaŭ du futojn alte. La skienoj rukulis, trancil-fiŝoj<sup>‡</sup> kuŝis argentebrilante kiel longaj spadoj, platuloj<sup>‡</sup> kaj buŝetuloj<sup>‡</sup> maldikaj kaj plataj kiel tifaaj ventumiloj saltetis supren kaj malsupren. La malbelaj buŝeguloj kjebacioj<sup>‡</sup> tenis buŝplenon da fiŝetoj en sia lavopelvo-simila buŝego kaj ne ellasis. Ĉiuj ŝipanoj—la maŝinisto, la vicmaŝinisto, la kuiristo

kaj fiŝkaptistoj—elvenis, pretigis la kestojn kaj starante sur la fiŝamaso levis la fiŝojn per grandaj ŝoveliloj. Eĉ la ŝarkidoj en la ventro de la patrino-ŝarkoj estis elpremitaj. Skvamoj kaj gluecaj mukoj sur la fiŝkorpoj disŝprucis. Ĉies vizaĝo esprimis nekaŝeblan ĝojon, precipe la vizaĝo de Juĉjo, kiu malfermegis sian buŝon por ridi ĉe ĉiu enpuŝo de la ŝovelilo.

Antaŭ ol ni povis tute enkestigi la fiŝojn, la maljuna ŝipestro subite levis signal-flagon, ke la ŝipo n-ro 10 haltu. Li kriis streĉe:

"Malbone! La ŝipo denove ne moviĝas. Estas certe, ke la reto de n-ro 10 kroĉiĝas sur rifo."

La ŝipo n-ro 10 verŝajne ne konsciiĝis kaj senkomprene direktiĝis al nia flanko. La maljuna ŝipestro frapadis per la piedo:

"La reto alkroĉiĝas, vi mortuloj! Tuj levu la reton per la kapstano!"

Ambaŭ ŝipoj ekturnis la kapstanon. Fine niaflanke ambaŭ la ŝtalkinglo kaj la retŝnuro estis levitaj, dum ili nur levis la ŝtalkinglon. La tuta retŝnuro kun la reto mem malaperis. La perdo estis tro granda. Jam ne menciui la reton, sed kiom kostus eĉ simple la retŝnuro pli ol okcent futojn longa! La maljuna ŝipestro morte paliĝis kaj ne eligis eĉ unu vorton. Nia ŝipo ĵetis ankron en tiu loko kaj n-ro 10, prenante nian ŝipon kiel orientilon malsupren lasis ankretojn por eltreni la reton.

La senespera atendo senpacienigis nin. Multe el la ŝipanoj dormemis sub la varmo de la posttagmeza suno. Juĉjo kaj Malgranda Jang, sidantaj sur la malseka ferdeko, ekronkis unuaj, kun la kapo klinita kaj salivo fluetanta de la buŝangulo. Ili estis lacegaj kaj dormis tre dolĉe. Nur la maljuna ŝipestro, kiel antaŭe, etendis sian kapon trans la fenestron de la direktilejo kaj rigardis en la direkto de n-ro 10 kunpremante la dikajn lipojn. Kvankam estis en plena tago kaj la suno pendis superkape, sed estis pli kviete ol en meznokto sur la tero, kiam ĉesis funkcii la motoro.

Pasis ĉirkaŭ du horoj, kiam la suno jam kliniĝis okcidenten, n-ro 10 revenis. De malproksime oni povis legi la deprimatecon el ĝia movo. Verŝajne ĝi ne eltrenis la reton. Iu el ĝia ŝipanaro demandis timeme:

"Kion fari? Ĉu ni veturu hejmen?"

Nia estis la ĉefa ŝipo. N-ro 10 devis agi laŭ nia direktado. Reveturu aŭ ne, tio decidis la ĉefa ŝipo. La maljuna ŝipestro, ŝajne, ne plu povante reteni sian emocion, kriis malbonhumore:

"Se nenio estas farebla, vi reiru unue!"

N-ro 10 veturis okcidenten malvigle.

La motoro ekmuĝis. Vekiĝis ĉiuj dormantoj. Ni levis la ankron. Mi kredis, ke ankaŭ ni hejmeniros. Sed la ŝipo turnis sin kaj veturis en la kontraŭa direkto kaj rehaltis poste. Kinĉjo, la ĉefmaristo, divenis kion intencas la maljuna ŝipestro kaj admonis milde:

"N-ro 10 provis plurfoje kaj ne sukcesis. Forta estas la fluo. Kiu povus diri kien ĝi estas forportita nun?"

"Ni ellasis la reton laŭ la fluo, kiu ankoraŭ ne ŝanĝis sian direkton. Se la reto estas efektive alkroĉita,

ĝi ne povas esti forportita." La maljuna ŝipestro parolis kun la esprimo de plena memfido. Li jam komencis sin senvestigi. Subite la amaso kriis ĥaose, ĉar ĉiuj volis lin malpersvadi.

"La akvo estas tro profunda, vi ne povas atingi la marfundon."

"Vi estas maljuna kaj ne povas elteni."

"Kien vi irus serĉi ĝin en tia vasta maro?"

"....."

La maljuna ŝipestro surmetis la kaŭĉukajn okulvitrojn kaj klarigis al ni kun senzorga rideto:

"Mi rakontis al vi hieraŭ, ke mi ne povas preterlasi eĉ etan malŝparon. Kiom da fojoj niaj du ŝipoj devas marvojaĝi por reperlabori tiom, kiom la reto kostas? Se mi hejmenirus ne malsuprenirinte por eltrovi la veran staton, mia konscienco neniam trankviliĝos dum la tuta vivo."

Kiam li paŝis al la ŝiprando kaj estis saltonta malsupren, li refoje turnis sin al ni kaj diris trankvilige: "Kiu ne sciis, ke mi estas spertulo en haliotokolektado?" Tion dirinte li ridante saltis en la maron de sur la maldekstra ŝiprando.

Ĉiuj en la ŝipo konservis mortan silenton kvazaŭ je komando. Neniu emis paroli. Ĉiu rigardis la maron koncentriĝe, esperante vidi la movojn de nia maljuna ŝipestro sub la akvo.

Post malmulte da minutoj li aperis ĉe la dekstra flanko, kaj eligis longan spiron elmerginte sian kapon. Li supreniris la ŝipon, ĉiuj ĉirkaŭis lin kaj frotis la korpon por li. Juĉjo diris al mi, ke ju pli profunden oni iras, la marakvo fariĝas des pli malvarma, penetranta, malmola kaj netolereble prema, sen-spertuloj eĉ unu minuton ne elportus. Neniu menciis la reton, kvazaŭ oni ne atendis, ke li trovos ĝin. Ekparolis la senpacienca Malgranda Jang.

"Ĝi ne estas trovebla, ankaŭ ni hejmen veturu!"

La maljuna ŝipestro ĵetis al li koleran rigardon: "Mi malsupreniris nur unu fojon, ĉu vi jam estas tiel senpacienca? Tri fojojn almenaŭ!" Kvazaŭ li interkonsentus kun iu antaŭe, ke li devas iri trifoje.

Li cerbumis longe, gratante sian kranion kaj ordonis, ke la ŝipo iru maldekstren ĉirkaŭ cent metrojn kaj haltu. Li refoje saltis en la maron. La trian fojon li restis en la akvo ĉirkaŭ ses minutojn. Laŭ lia aserto li iris preskaŭ dek klaftojn profunden. Ne estis facile. Kiam li revenis sur la ŝipon, lia vizaĝo estis malhele purpura kaj lia forto preskaŭ elĉerpita, sed li ne trovis la reton. Oni subtenis lin sub la brakoj. Nur jam trifoje li provis, oni devis postuli reveturi, sed eĉ Malgranda Jang restis silenta.

Longe ripozis la maljuna ŝipestro kaj denove manovris ĉe la direktilo. Li intencis provi ankoraŭfoje, sed estis maloportune eldiri, same kiel por la aliaj lin malpersvadi. Ĉiuj rigardis unu la alian kaj kvazaŭ interkonsiliĝinte inter si la naĝpovaj jam komencis senvestigon. Ŝipistoj saltis en la maron de ĉiu flanko. Kvankam ili ne estis sufiĉe lertaj, por iri profunden kaj resti tie longe, tamen ĉiu sentis, ke li havas la devon malsupreniri.

La nelertaj elmergiĝis post unu-du minutoj. Ĉifoje ankaŭ la maljuna ŝipestro tuj supreniris post la ensalto. Eligante sian kapon sur la akvon li kriegis ĝoje:

"Ĝi estas proksime en tiu flanko kaj videbla. Ĉiuj suprenvenu tuj. La akvo estas tro profunda, almenaŭ dek kvin klaftojn, alie mi malsupren irus por ĝin eltiri per hoko."

Nun revigliĝis la atmosfero sur la ŝipo. Juĉjo kaj Malgranda Jang denove kriegis kaj laŭte kantis senzorge. Oni okupiĝis kun fervoro, ĵetis malsupren la ankretan, kaj tiris per la ŝipo. Momenton poste kaj la reto kaj la ŝnuro estis levitaj. Ĉiuj ĝojkriis kvazaŭ ili malkovrus trezoron. Kvankam la reto difektiĝis je kelkaj truegoj, la fundo de la reto ankaŭ rompiĝis kaj bezonis longtempan riparon, tamen tio estis granda triumfo de la fideleco, prirespondeco al la ŝtata posedaĵo. Ĉiu sentis sin venkinto kun senlima ĝojo.

La kamaradoj purigis la ferdekon kun fervoro kaj Juĉjo kaptis ŝarkon per ambaŭ manoj kaj frotis per ĝi la ŝiprandon pura kaj blanka. La reto estis pendigita sur la masto por sekigi. Malgranda Jang ordigis la neuzitajn malplenajn kestojn ion zumante. Li levis keston kaj volis ĝin ĵeti flanken, sed ekmemoris ion kaj ne elmanigis ĝin kun grimaco de langomontro. Li zorgeme ĝin forportis. La maljuna ŝipestro refariĝis granda knabo kaj diris ŝerce:

"Kvankam n-ro 10 hejmeniris pli frue, sde certe ĉiuj malbonhumoras kun elpuŝita buŝo kiel porkoj. Ili ne povos esti gajaj antaŭ ol ni alvenos."

La suno jam kliniĝis al la horizonto kaj estis senforte flava. Malpezaj nuberoj estiĝis sur la ĉielo. La lanugecaj nuberoj fariĝis nigra nubego kaj stariĝis tre alta kaj regula nubmuro ĉe la renkontiĝo de akvo kaj ĉielo en la okcidento. Kvankam tre kviete estis sur la maro, sed impona minaco regis en la atmosfero kvazaŭ iu giganto estus aranĝanta aplombe iun grandan kaj teruran katastrofon. Ekgriziĝis la marsupraĵo. Komenĉiĝis tumulteto. La maljuna ŝipestro iom rigardis.

"Ho! Tia ĉielo! Jen ŝtormopreta vetero!"

Aŭdinte lian aserton, ankaŭ mi vidis la antaŭsignon de eksplodonta ŝtormo. Ĉio spiris je uragano, sed estis feliĉe ke la ŝipo eniros la havenon hodiaŭ nokte.

Jam noktiĝis kiam ĉio estis ordigita. La ŝipo direktiĝis okcidenten kun plena rapido.

La lumturo sur la insulo flagris en malproksimo. La homoj, kiuj penlaboris dum tuta semajno endormiĝis. En la direktilejo eliĝis la laŭta voĉo de la maljuna ŝipestro, kantante kanton ne tre laŭtakte.

Tradukis S. J.

\* *Mar-kato*: mevo. "*Manĝigi mar-katojn*" signifas "*vomi*",—*Rimarko de l' verkinto*.

† *Kalabaso-graplado*: kiam la kunula ŝipo enfaligas la reton, ĉe la ekstremo de la ŝtalkinglo estas ligita naĝbarelo, kiun la alia ŝipo elgraplis per hoko. Tiu ĉi tasko estas tre danĝera en ventego.—*Rimarko de la verkinto*.

‡ *Specoj de fiŝoj*.

## Al Neruda

— Ŝe Fang-ju —

Antaŭ ol vi vidis Tien-an-Pordegon en Pekino  
Kaj viaj piedoj enpaŝis La Nordan Stacion de  
Ŝanhajo,

Viaj poemoj jam vizitis la korojn de l' ĉinoj.  
Ĉila civitano sed ribelulo por Prezidanto Videla,  
Neruda, vi estas poeto de l' tutmonda popolo.  
Via saĝo apertenas al la tuta homaro.  
Priĉasata de policanoj, vi pasigis vivon  
De rifuĝanto sub persekutado  
Sur la tero kiu vin nutris.  
Sed ĉie la popolanoj malfermis sian pardonon,  
Etendis siajn manojn al vi, kisante vian batalan  
glavon,

Kiam ajn vi trairis arbaron aŭ vilaĝon.  
Pro ĉio ĉi, poeto, la animo de Ĉilio,  
Hodiaŭ ankaŭ la ŝanhajanoj  
Etendas siajn brakojn al vi  
Kaj kun glaso plena de vino  
Akceptas vin kiel sian propran fraton.  
Popolanoj atendas la alvenon de la tago  
Kiam Bolivar, la liberiganto  
Levos la flagon pro justeco  
Kaj Neruda en San Diago  
Plenglason da samspeca vino  
Por bonvenigi la unuajn vizitantojn el Ĉinio.

Elĉinigi S. J.

## Al Erenburg

— Ŝe Fang-ju —

La landon, de kie vi venas,  
Ni amas samkiel nian propran.  
Ni amas ĝin, ĉar tie estas  
Stalin kaj la supereca socialisma ordo;  
Ni amas ĝin, ĉar tie vivis  
Puŝkin, Tolstoj, Gorkij  
Kaj nun vivas ankaŭ Erenburg.  
Iljuŝa, ni amas vin  
Ne nur pro tio, ke vi estas Sovetia verkisto,  
Sed ankaŭ pro tio, ke vi estas kuraĝa batalanto.  
Hitler metis vian nomon en la nigran liston  
Kaj ĵuris vin mortigi,  
Sed eĉ tiam viaj verkoj  
Fariĝis jam parto de niaj vivo kaj penso.  
Iljuŝa, vi estas nia propra frato.  
Vi abomenas kion ni malbenas,  
Kaj amas kion ni adoras;  
La pacon, kiun vi defendas  
Ankaŭ ni defendi volas.  
Se hodiaŭ la militagentoj en Vaŝingtono  
Ankoraŭ ne estas senditaj en frenezulejon,  
Jam morgaŭ militan tribunalon ni organizu por ili!  
Tiu tago nepre venos!  
Tiam, Iljuŝa,  
Pli valorajn romanojn vi kreos.

Elĉinigi S. J.

# Korajn Dankojn

ni ŝuldas al ĉiuj gekamaradoj kaj organizoj kiuj utiligis artikolojn, informojn, kantojn kaj bildojn el nia gazeto per represo, traduko, disaŭdigo kaj ekspozicio, kaj por esprimi nian dankon ni sendos al ili po ekzempleron de niaj nove aperintaj broŝuroj. Ilia valora kunlaboro ne nur pliintimigis la amikajn rilatojn inter la ĉina kaj alilandaj popoloj, plifortigis la internacian solidarecon kaj helpis la disvolvon de la porpaca movado, sed ankaŭ pruviĝis forta apogo por la disvolvo de la progresema Esperanto-movado. Ni esperas, ke ĉiuj niaj legantoj imitos ilian bonan ekzemplon, kaj ni estas certaj ke la praktika utiligo de Esperanto en la porpaca batalo ankaŭ havigos pli fortan subtenon de la popoloj al la progresema Esperantomovado. Por ke nia bulteno povu liveri al vi pli da utiligeblaj materialoj, ni tre deziras aŭdi viajn valorajn konsilojn kaj bonvolajn kritikojn pri la enhavo de nia gazeto.

Kelkfoje ni informiĝis de alilandaj kamaradoj, ke ili trovis tradukaĵojn de niaj artikoloj en nacilingvaj gazetoj, sed ni mem ricevis nenian informon rekte de la utiligintoj de niaj materialoj. Ne forgesu sendi al ni dokumentajn ekzemplerojn de gazetoj kaj ĵurnaloj se vi sukcesos aperigi sur ili tradukaĵojn de niaj artikoloj aŭ informoj, ĉar tio ne nur helpas nin mem konstati la utilon de nia modesta bulteno, sed ankaŭ helpas nin konvinki la neesperantistojn pri la utilo de Esperanto en la servado al la popolo kaj mondpaco.

Jene ni aperigas la unuan liston de niaj kunlaborantoj (ni devas rezigni kun bedaŭro la aperigon de la nomoj de la japanaj gekamaradoj por eviti persekuton fare de la japanaj kaj Usonaj reakciuloj):

Lando	Utiliginto	Nombro de Artikoloj
Aŭstralio	Mrs. A. Groenewg	1
Aŭstrio	Johann Hoschtalek	1
Britio	Socialist Leader	1
	The Worker Esperantist	1
	C. Fielding	2
Bulgario	I. Kovaĉev	17
	Tinka Lakova	2
Ĉeĥoslovakio	Miloslav Janek	1
	Magda Seppova	1
	E. V. Tvarožek	3
	Jan Lamaĉka	1
	Imrich Zalupsky	7
	A. Stanura	1
Finnlando	Lauri Laine	2
	Vaino Mehtonen	2
	Alex Pinhkanen	2
	Niilo Kavenius	16
Francio	Le Ralliement	1
	La Voix	1
	Esperanto-traduko-servo de SEAT	3
Germanio (D.D.R.)	P. Glockner	1
	Karl Dietz	2
	Herbert Kinzel	8
	Herbert Trummer	3
Islando	Sigurdur Gudmundeson	3
Japanio	Diversaj kamaradoj k gazetoj	41
Svedio	Einar Adamson	1

La Redakcio de El Popola Ĉinio

## Ni Ĵuras Batali ĝis la Finfina Venko

Estimataj sinjoroj,

Spite de rezisto de plejmulto de pacamaj popoloj, malaminda nia reakcia registaro subskribis la traktaton por kontraŭstari al Sovetio, Ĉinio kaj aliaj demokratiaj landoj lastan jaron en San-Francisko.

Ni tre bedaŭras kaj hontas pro malsukceso de tiu ĉi rezistmovado por paco. Neniu japano deziras militi, precipe kun popoloj de Azio. Ni ĉiuj bone scias ke Japanio ne povas memstari ekonomie en paco sen intima interligiĝo kun landoj de Azio, precipe kun la granda Ĉinio.

Nun la registaro deklaris la planon havi intiman interilaton kun Kuo-mintanga perfidulo, ignorante la pravan Popolan Registaron. Tio estas mokinda kompatinda freneza politiko, kiu baldaŭ devas malsukcesi.

Renversi ĉi tiun agent-registaron de imperialistoj estas ja nia devo, tiel mi pensas.

Kun tiu ĉi letero, mi sendas al vi manpresajojn, laŭ via regulo kvar ekzemplerojn de la organo de

klubo de kinoamantoj en ĉi sanatorio. Mi kontribuis tradukon de artikolo pri kinokampo el aŭgusta numero lastjara de via bulteno "E. P. Ĉ."

Pripensu pri tio, ke nia regno estas koloniigata kaj malantaŭen-paŝanta regno en ĉiu kampo. Plejmulto de popolamasoj de Japanio vivas mizere sen idealo, sen espero, ĵetdonate per



koloniecea triviala kulturaĉo.

Sed ni ĵuras batali ĝis la tago de nia finfina venko.

Dankante vian konstantan amikecon mi kore salutas vin.

Via M. K., Japanio

## Ciu Honesta Homo Devas Esprimi Sian Indignon Kontraŭ Usonaj Militkrimuloj

Karaj kamaradoj,

La sciigoj pri la novaj krimaĵoj de la agresantoj en Koreio, la bakteria milito, en la nuna momento konsternis ĉiujn honestajn homojn kaj multaj diris ke tiaj fiulaĉoj ne povas ekzisti en la mondo. Sed kiam la koreanoj kaj ĉinoj povis montri nekontraŭdireblajn pruvojn je la afero, la konsterno ŝanĝiĝis je kolerego kiu rezultigis ondegon da protestoj kontraŭ la krimuloj. Sed ankoraŭ la protestoj ne sufiĉas. Ĉiu honesta homo devas esprimi sian indignon kaj koleron pri tiuj malhonoraĵoj tiel ke la militkrimuloj ne kuraĝu daŭrigi siajn fiagojn.

Ĉiuj devas memori kion diris la 3an de aprilo je kunveno en Stokholm, la vicĉefministro de Ĉinio, Kuo Mo-ĵo:

"La bakterioj estas blindaj. Se ne la katastrofo kiu nun minacas Koreion kaj Ĉinion estos hodiaŭ haltigita, ĝi morgaŭ trafos la tutan homaron."

Mi finas per la plej varmaj deziroj pri sukceso en via oferema laboro por la mondpaco.

K. V. Ahlberg. Svedio

Prezidanto de Stokholma

Esperantista Packomitato

## Multiĝas Senlaboruloj, Regas Ekonomia Malvigleco

Karaj kamaradoj,

Legante viajn gazetojn mi forte sentas vian forton kaj mi kuraĝiĝas.

Kiel giganta forto de nova popola Ĉinio kaj Sovetio por paco tutmonda!

Japanaj reakciuloj propagandis kaj trompis al multaj japanoj. Ili kontraktis apartan packontrakton sen partopreno de popola Ĉinio kaj Sovetio kaj ili fanfaronis al la japana popolo. ke la kontrakto alportas, alportos al ni progreson; kaj ke en Japanio fremdlandaj armeoj estis ĝentilaj kaj nun estas kiel antaŭe, ili estas kaj estos nia japana protektanto, k.a. Ili ankoraŭ senhonte kalumniis: "Ĉiuj Sovetiaj satelitaj landoj kaj Sovetio intencas invadi al Japanio." Sed la mensogoj en tiuj ĉi dolĉaj vortoj estas senkompate malkaŝataj per ĉiutagaj realaj okazaĵoj.

Nuntempe reakciuloj planas revizii leĝojn de ŝtatdefendo, kiu mortigis tre multajn progresemajn japanojn ĝis la tago de malvenko.

Multaj japanoj havas tre grandan malkontenton al reakciuloj kaj publike aŭ kaŝe kontraŭstaras ilin.

Tagon post tago multiĝas senlaboruloj kaj regas ekonomia malvigleco pro ilia politiko.

Mi estas senlaborulo de post novembro, 1950. Ankaŭ mi esperis partopreni japanan delegacion al la Konferenco de Internacia Ekonomio en Moskvo por prospero de Japanio. Tamen oni malpermesis iri al la kunveno. Sed mi kredas ke jam proksimiĝas la tago de popola Japanio, kiu promesos multajn panojn kaj laborojn al ni, kaj tiam ni manpremos kun via popolo kaj la popoloj de aliaj demokratiaj landoj.

Kun kamarada saluto

Sincere via

T. K., Japanio

## Jen Jus Aperis

Por Nova Afero, Nova Maniero, 196-paĝa kolekto de noveloj el **El Popola Ĉinio**. Ĝi kostas kiel tri numeroj de **El Popola Ĉinio**.

La Plej Forta Voĉo de la Paco, 56-paĝa kolekto de poemoj el **El Popola Ĉinio**. Ĝi kostas kiel 1 numero de **El Popola Ĉinio**.

Mendu ilin ĉe nia administracio aŭ perantoj!

## Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj dezirataj kondiĉe ke ili ne estos malice kripligataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.

2) *Sendi al ni 4 ekzemplerojn* de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.

3) Sciigi al ni kia estas la *jurnalo aŭ gazeto*, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

“Plej bona propagando estas praktiko”. Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo!

La Red.

## EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno eldonata  
de Fremdlingva Eldonejo

26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

## ENHAVO

*Bildo sur la kovrilo—Ŝpinistinoj  
en Fervora Legado*

Majtago, 1952

Ĉinaj Laboristoj Marŝas Antaŭen  
Eterne Glora Batalanto de Internaciismo

Raporto de Kuo Mo-ĵo pri la  
Krimago de Usono

La Hejma Merkato de Ĉinio  
Vigliĝas

La Interhelpa Grupo de Han En  
sur la Vojo de Agrikultura  
Kooperativo

Giganta Ŝirmforstzono por Nord-  
orienta Ĉinio

*Nova Ĉinio en Bildoj*

Disvolvo kaj Plifortigo de Kul-  
turaj Rilatoj inter Popoloj

Komuna Volo de l' Homa Rond'  
La Maljuna Ŝipestro

## PAGU AL NIAJ PERANTOJ

**Aŭstralio:** Steve Bennett, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park,  
N. S. W. (Jarabono 7s. 6p.)

**Aŭstrio:** Antonio Balague, St.-Pölten, Kirchenweg 12.  
(Jarabono 20 schilling-oj)

**Belgio:** Walraevens Rajmundo, Rabelais Strato, 10, Bruselo.  
(Poŝteekonto: 16, 43, 53) (Jarabono: 50 bfr.)

**Britlando:** (1) F-ino F. Paraige, 10 Woronzow Road, St. John's  
Wood, London, N. W. 8. (Jarabono 6 ang. ŝil.)  
(2) **Universala Esperanto-Asocio**, Heronsgate, Rick-  
mansworth, (Herts.).

**Bulgario:** (1) **Bulgara Esperantista Kooperativo**, Sofia—Str. TRI  
UŜI, 15. (Jarabono 200 Lv.)  
(2) Ivan Kovaĉev, Sofia, str. “Iv. Bigor” no. 24.

**Ĉeĥoslovakio:** Burda Rudolf, Plzen-palackeho N. ĉ. 6,  
(Jarabono 50 kĉs.)

**Danlando:** Borge Astrup, Ymersvej 32, Randers.  
(Jarabono 6 kronoj)

**Finnlando:** Niilo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14, Turku 9.  
(Jarabono: 300 Fmk.)

**Francio:** Labor-Esperantista Federacio, sekretariejo: 4 str. Gen.  
Malleterre, PARIS 16. CCP 902-52 (Jarabono: Fr. F. 450)

**Germanio:** (1) Helmut Löffler, Mittweida/Sachsen, Theaterstrasse 1.  
(Jarabono: 6 D.M.)  
(2) Heiny Knorr, (24) Hamburg-Wellingsbüttel,  
Ekerkamp 81.

**Hungario:** (1) KULTURA, Budapest, V. Akademia u. 10.  
(Jarabono 15 forintoj)  
(2) Marton Lajos, Bors.-u. 2, Budapest, XII,  
(poŝtkonto 38.187)

**Islando:** Siguldur Gudmundsson, Falkagata 1, Reykjavik.  
(Jarabono 15 kronoj)

**Italio:** Eduardo Zumbo, Casella postale 226, Torino.  
Torino. (Jarabono: 400 liroj)

**Izraelio:** Bencion H. Danon, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)

**Japanio:** (jarabono 360 jen-oj)

**Nederlando:** (1) Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223,  
Scheveningen. (Jarabono fl. 3.50)  
(2) Esperanto-Grupo Vaals, Pr. Bernhard-str. 4, Vaals.

**Pollando:** Asocio de Esperantistoj en Pollando, Warszawa Marszal-  
kowska 81/32. (Poŝteka konto I—4329/113)  
(Jarabono 12 zl.)

**Rumanio:** Rumana Esperantista Societo, București I, Bulev. 6  
Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)

**Svedio:** Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg.  
(Jarabono 5 kronoj)

**Usono:** (jarabono \$1.25)

**Rim:** Legantoj en aliaj landoj povas pagi per respond-kuponoj  
(1 rk. kontraŭ 1 ekz.) aŭ egalvaloraj Esp-aj libroj (sed ne gazetoj).  
Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu kiu letere postulos.

類  
北  
京  
郵  
政  
管  
理  
局  
登  
記  
執  
照  
第  
一  
類  
新  
聞  
紙  
第  
三  
十  
六  
號